

## Enhavo

1	Esperanto en la Interreto ( <i>Bertilo Wennergren</i> ) ..... 2
2	Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes, kaj ne! ( <i>Detlev Blanke</i> ) . 11
3	Pri la eŭropa lingvo-problemo vidpunkte de irlanda diplomato – Recenzo ( <i>Sabine Fiedler</i> ) ..... 16
4	Bibliografioj kaj bibliotekoj..... 17
4.1	Elektronika Bibliografio de Esperanto-Artikoloj (EBEA) ( <i>Bernard Pabst</i> ) ..... 17
4.2	Bibliografio de “Modern Language Association of America” (MLA) ( <i>Barbara Chen</i> )..... 18
4.3	Kolekto en la universitata biblioteko de Amsterdam ( <i>Wim Jansen</i> ) ..... 21
4.4.	La kolekto de Károly Fajsz en hungara biblioteko ..... 21
4.5	Pri bibliotekoj kaj arkivoj en Herzberg ..... 21
5	Aranĝoj pasintaj..... 22
5.1	Konferenco „Strukturo kaj Evoluado de Esperanto – vidpunktoj de ĉinoj” ( <i>LIU Haitao</i> )..... 22
5.2	Teknologia konferenco en Vilno ( <i>Povilas Jegorovas</i> )..... 24
6.	Honorigoj al la lingvisto kaj interlingvisto Paul Ariste (1905-1990) ..... 24
6.1	Konferenco memore al Paul Ariste ( <i>Povilas Jegorovas</i> )..... 24
6.2	Internacia premio ACADEMICUS ARISTE..... 25
7	Kvara Nitobe-simpozio okazonta ..... 26
8	Universitataj disertacioj ..... 27
9	Ottó Haszpra – membro de la Hungara Akademio..... 27
10	Pri GIL en Idó ..... 28

# 1 Esperanto en la Interreto

## Bertilo Wennergren

La sekva teksto aperis en la aktoj de la 13-a konferenco de „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.”, GIL (Societo pri interlingvistiko), kiu okazis en 2003 en Berlin. La teksto aperis dulingve (paralele en Esperanto kaj la germana) kun jena bibliografia registro:

*Wennergren, Bertil (2003): Esperanto im Internet / Esperanto en la Interreto. En: Blanke, Detlev (Red.): Spracherfindung – Sprachplanung – Plansprachen. Beiträge der 13. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 28.-30. November 2003 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 11. Berlin: GIL, p. 93-122.*

Ni represas la tekston kun permeso de la aŭtoro.

Red.

### 1.1 Enkonduke

La temo “Esperanto en Interreto” estas temo malfacile traktebla, ĉar nesuperrigardebla. Mi tamen provos, ĉar eĉ la maleblon oni devas foje trakti. La bildo, kiun mi donos, estas neeviteble forte kolorita de miaj propraj interesoj kaj Retaj spertoj, kaj mi sendube preteriros silente multon, kiun aliaj traktus kiel nepre gravan. Mi anticipe petas pardonon pro tio. Mi pardonpetas ankaŭ, ke mi eble iom tro mencias Retaĵojn, kiujn mi mem kreis, aŭ en kiuj mi mem partoprenas.

Mi fariĝis Interretano en 1994, se mia memoro ne trompas min, kaj mi ankoraŭ klare memoras mian unuan renkontiĝon kun tiu furora kaj tute nova medio - nova por la ĝenerala publiko. Mi ie trovis publikan komputilon kun Interreta konekto (kio tiutempe ne estis kutima afero), kaj mi kompreneble tuj saltis al serĉomaŝino (al la tiutempe plej ofta, “AltaVista”) en la t.n. “Tut-Tera Teksaĵo”, mallonge TTT, kaj - kompreneble - tuj entajpis la vorton “Esperanto”. Mi ricevis imponan liston de trafoj, kio montras, ke jam en tiu frua jaro Esperanto estis vigle ĉeesta en la Reto. (Mi diras “frua jaro”, ĉar la tempo pasas almenaŭ 10-oble pli rapide en la Interreto ol en la “reala” mondo.)

Mi evidente sentis min jam dekomence kiel hejme antaŭ la ekrano, kaj rapide alklakis iun hazarde elektitan adreson, kaj saltis de ĝi al alia interesa, ĉiam temanta iel pri Esperanto, pere de la hiperligoj, kiuj karakterizas TTT-paĝojn. Kaj post eble nur kvar aŭ kvin rapidaj alklakoj, mi surprizite trovis min rigardanta bildon de mi mem, kiun iu enmetis en la Reton. Tio forte impresis min. Ne ĉar mi ŝatas rigardi bildojn de mi mem, sed ĉar tio frape montris al mi, kiom viva evidente estis la Esperanta komunumo en la Interreto jam en 1994. Mi, kiu eĉ neniam antaŭe vidis la Interreton, tamen jam estis en ĝi sen scii pri tio, kaj mi estis tie kiel Esperantisto.

Kiom da Esperantaj paĝoj estis tiam en la Reto, tion scias neniu, kaj de tiam la nombro nur multobliĝis kaj ree multobliĝis preter ĉiaj limoj. Foje oni vidas statistikaĵojn pri la nombro de Esperantaj aŭ Esperanto-rilataj Interretaj paĝoj, sed tiujn nombrojn oni ne akceptu senkritike. Nombri paĝojn estas preskaŭ maleble, eĉ la grandaj serĉoservoj en la Reto ne plu povas doni klaran bildon pri la nombro de paĝoj Interretaj entute - interalie ĉar ne eblas klare difini, kio estas unu Reta paĝo. Krome la serĉoservoj ne tre bone scias eltrovi, en kiu lingvo estas paĝo. Sed oni povas eble diri - simile kiel oni diras pri la nombro de Esperantistoj en la mondo, nome ke estas multe pli ol oni iam povas renkonti - ke estas multe pli da ili ol unu homo povas iam legi. Estas do praktike senlime multe da Esperantaj paĝoj en la Interreto.

### 1.2 Guglo

Per tio ni venas al kredeble la plej grava Esperanta paĝo Interreta: “www.google.com”, aŭ Esperante “Guglo”. Eble tio surprizas iujn, sed estas fakto, ke jam de almenaŭ du jaroj, oni povas

uzi la nuntempe preskaŭ senkonkurence plej popularan serĉomaŝinon pure en Esperanto. En la agordopaĝo de Guglo oni povas elekti interfacan lingvon, kaj en la longa listo de lingvoj sin trovas ankaŭ la Internacia Lingvo de Zamenhof. Mi mem uzadas Guglon kun Esperanta interfacilo, kun ĉiuj belaj supersignoj, kaj tio eĉ ne plu estas sensacia afero. Fariĝis jam rutinaĵo trovi Esperanton listigitan senceremonie inter aliaj gravaj mondaj lingvoj en tiaj kunteksto. Kaj fariĝis jam tute kutime kaj rutine uzi la Esperantajn specialajn literojn en la Reto (kaj ĝenerale en komputiloj) pro la rapida disvastiĝo kaj akceptiĝo de Unikodo, la universala signokodo, kiu egaligas ĉiujn skribosistemojn en la mondo. En Guglo oni ankaŭ senprobleme entajpas serĉovortojn en Esperanto, kun la specialliteroj, kiuj ankaŭ interpretiĝas ĝuste de Guglo.

Sed kompreneble neniu kontentiĝas resti ĉe bela Gugla serĉopaĝo en Esperanto. Ĝi estas nur la ekirpunkto por trovi ion pli interesan. Ni prove entajpu la vorton “Esperanto”, same kiel mi faris jam en 1994. Ni trovas tiam la jenon:

- Esperanto: Multlingva Informcentro pri la Internacia Lingvo
- Virtuala Esperanto-Biblioteko
- Esperanto Access
- ttt.esperanto.org
- (Kaj 839.000 aliajn trafajn.)

### 1.3 Lerni Esperanton

Tie ni do trovas unue paĝojn, kiuj informas al la publiko pri Esperanto, precipe en naciaj lingvoj. Tiu kategorio tamen nun ne tro interesas nin. Ni volas en la Reto uzi Esperanton, aŭ almenaŭ ĝin lerni. Ni tajpu do anstataŭe “learn Esperanto” (uzante la “alian” internacian lingvon). Aperas denove vasta kolekto de tiurilataj paĝoj. Mi menciis el tiuj nur du lastatempe furorajn:

- “Lernu”: Plurlingva kursejo, kiu celas helpi al retemuloj lerni Esperanton en facila kaj senkosta maniero.

Temas pri tre ambicia kaj sukcesa projekto financata de “Esperantic Studies Foundation” en Usono. Tiu kursejo, kiu funkcias plene ene de TTT-legilo, suferas verdire nur de unu grava problemo: Oni havas tro da lernantoj, kaj maltro da instruistoj. Alispeca estas:

- “Kurso de Esperanto”

Ĝi estas Brazildevena ne pure Interreta kurso, ĉar temas pri programo, kiun oni elŝutas el la Reto (aŭ ricevas sur kompakta disko), kaj poste uzas en sia propra komputilo por lerni la lingvon.

Estas ankoraŭ kelkaj dekoj da aliaj altkvalitaj kursopaĝoj, kaj ankoraŭ pli da ne tiom altkvalitaj. Mi forte suspektas, ke el tiuj homoj, kiuj nun estas lernantoj Esperanton, plimulto faras tion per la Interreto, almenaŭ en riĉaj landoj, en kiuj Reta konekto estas facile havebla.

Sed lernanto de Esperanto bezonas ankaŭ aliajn helpilojn, ekz. gramatikon. Tiam mi ne povas ne menciiti tiun gramatikon, kiun mi mem verkis, kaj kiun mi en-Retigis jam iam en 1994 aŭ 1995:

- PMEG: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

Temas pri hiperteksta gramatiko (tute en Esperanto) proksimume same detala kaj ampleksa kiel la Plena Analiza Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien, sed verkita en multe pli facile komprenebla stilo, kaj do - espereble - uzebla jam por lernantoj, kiuj venas de ekz. “Lernu”. Sed tiuj povas ankaŭ sin helpi per la pli malnova verko “La tuta Esperanto” de Seppik, kiu estas en-Retigita komplete kadre de “Lernu”.

Mi eĉ kredas, ke kun tiuj du ampleksaj verkoj gramatikaj, Esperanto estas ĉe la pinto inter ĉiuj lingvoj en la Interreto. Almenaŭ mi ne trovis kompareble detalajn gramatikojn pri ekz. la Angla aŭ la Germana en la Reto, kio verdire surprizas min.

## 1.4 Vortaroj

Alia grava helpilo por lernanto estas vortaro. Sur tiu kampo elstaras la Reta Vortaro, ReVo, kiu estas kunlabora projekto daŭre prilaborata surbaze de Plena Vortaro. Ĉiu ajn povas kunlabori, sed bedaŭrinde necesas por tio al kutimiĝi al la iom speciala, XML-bazita labormetodo de ReVo. Oni celas, ke ReVo iam povu konkurenci kun la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, PIV, kaj estas grandaj ŝancoj, ke tio iam sukcesos. Ĉiuokaze por tiu, kiu ne havas PIV-on, la Reta Vortaro jam estas tute respektinda alternativo, kaj ne malofte ĝi estas jam eĉ supera al PIV. Sed ĝi ne estas la sola Esperanta vortaro Reta. Mi donos kelkajn pliajn adresojn en la adreskolekto.

## 1.5 Retpoŝto, tujmesaĝiloj

Post lernado de la lingvo malfermiĝas senfina kampo de uzado. Ĝis nun mi parolis nur pri la Tut-Tera Teksaĵo kun ties hiperligitaj paĝoj. Sed la Interreto ne estas nur TTT. La plej grava parto estas kompreneble la retpoŝto, kiu jam fariĝis memkomprenebla komunikilo por multaj, foje pli grava ol telefono kaj papera poŝto. Kompreneble per retpoŝto komunikadas inter si la Esperantistoj jam de jaroj antaŭ ol aperis TTT, kaj tion ili plu faras, plene ignorante eventualajn problemojn pri supersignoj, skribante surogate aŭ ĉiam pli kaj pli ofte per Unikodo.

Oni komunikas tamen ne nur retpoŝte, sed pli kaj pli ofte per t.n. tujmesaĝiloj, precipe la junuloj - kaj tiurilate mi devas konstati, ke mi ne plu estas tia. Pri tujmesaĝiloj, per kiuj oni povas tekstobabili tuje, duope aŭ plurope, mi scias tro malmulte sentante min foje kiel dinosaŭro inter la junuloj, kiuj lerte kaj senpene uzadas tiun komunikilon. Cetero por esplorantoj de la lingvoevoluo tiu medio povas esti aparte interesa, ĉar same kiel oni konstatis pri naciaj lingvoj, en tujmesaĝiloj homoj tendencas eklingvi iom alie, per drastaj mallongigoj, per speco de nova ĵargono rapide ŝanĝiĝanta kaj evoluanta. Povas esti, ke tiu nova lingvaĵo estonte grave influos ankaŭ la ĝeneralan uzon de Esperanto.

## 1.6 Novaĵgrupoj

Kroma komunikilo estas la novaĵgrupoj, alia klasika parto de la Interreto, datumanta de antaŭ TTT, kaj alirata per specialaj novaĵgrupaj programoj, per kiuj oni legas t.n. “afiŝojn”, kiuj simple estas tekstaj mesaĝoj sendataj al konvenaj laŭtemaj novaĵgrupoj, kaj legeblaj de ĉiuj ajn, kiuj abonas tiujn grupojn. La elstara novaĵgrupo Esperanta estas “*soc.culture.esperanto*”, mallonge “s.c.e”, en kiu mi mem partoprenas multe tro ofte. Tie oni diskutas kaj babilas, foje eĉ kverelas pri plej variaj temoj. La onidiroj asertas, ke en s.c.e. oni parolas preskaŭ nur pri la lingvo mem, harfendante pri gramatikaj kaj vortuzaj temoj, sed tiuj onidiroj ne (tute) pravas. Oni parolas ankaŭ pri politiko, pri la vetero, pri matematiko, ja efektive pri ĉio ajn. Lastatempe eĉ estis tie longa debato pri teologio.

Tradicie novaĵgrupaj mesaĝoj restas legeblaj nur dum limigita tempo, kaj poste malaperas, sed tio intertempe grave ŝanĝiĝis. La jam menciita serĉoservo Guglo havas gigantan priserĉeblan arkivon de novaĵgrupaj afiŝoj de 1981 ĝis hodiaŭ. Per tiu arkivo eblas studi la uzon kaj evoluon de Esperanto en la Interreto dum 20-jara periodo. Tio povas esti tre interesa kampo por lingvoesploristoj. Tiu arkivo tamen ne estas nur laŭdata, sed ankaŭ foje akre kritikata, ĉar ne ĉiu, kiu skribis ion senpripensan kiel junulo en 1981, ŝatas trovi tion publike legebla en 2003.

## 1.7 Dissendolistoj

Gravan konkurencon ricevis la novaĵgrupoj per la lastatempe ege populariĝintaj dissendolistoj, precipe tiuj de “Yahoo Groups”. La mesaĝojn de tiuj listoj oni povas legi aŭ retpoŝte, aŭ per TTT-legilo. Ĉe “Yahoo Groups” ekzistas pli ol 200 listoj aŭ grupoj kun la vorto “Esperanto” en sia prezentoteksto. La temoj de tiuj listoj estas ofte tre specialaj, eĉ fakaj. Ni trovas tie publikajn listojn alireblajn por ĉiuj, kaj fermitajn listojn por ekskluzivaj grupoj. Al tiu lasta kategorio apartenas la dissendolistoj de la Akademio de Esperanto. Efektive en la pasintaj jaroj la Akademio de Esperanto faras sian laboron plejparte pere de la Interreto. Preskaŭ nur la voĉdonoj okazas plu ekskluzive

paperpoŝte, kaj eĉ tiuj kredeble baldaŭ Interretiĝos. Sed apud la Akademio ni trovas ĉe “Yahoo Groups” ekz. la listojn “per-esperanto-sporto”, “socia-forumo-esperanto”, “esperanto-anedkotoj” (por ŝercoj), “per-esperanto-politiko”, “per-esperanto-literaturo”, “utiligado-de-esperanto-faka-agado”, “per-esperanto-juro”, “pivgrupo” (kun diskutoj pri la Nova Plena Ilustrita Vortaro), “PasportaServo”, „terminologio”, plurajn listojn de Universala Esperanto-Asocio, UEA (kun foje tre akra interna debato), kaj fine eĉ la liston “malesperantistoj” (por homoj, kiuj seniluziiĝis pri la Zamenhofa lingvo).

Iomete simila al tiuj diskutgrupoj estas la servo de dissendolistoj starigita de UEA, “Abonu.com”, kun 39 diverstemaj dissendolistoj. Sed tie temas precipe pri informado unukanala, ne tiom pri diskutado.

Estas sufiĉe facila afero startigi tian dissendoliston aŭ diskutgrupon, eble eĉ iom tro facila, ĉar iuj tiaj grupoj ŝajnas eble iom superflujaj. Sed pri gustoj oni ne disputu. La Reto ĉiam estis loko, kie ĉiuj intereso povas flori, eĉ la plej strangaj. Do, se vi sentas, ke necesas ankoraŭ unu tia servo pri kampo, sur kiu vi mem laboras, ne hezitu. Sed eble kontrolu unue, ĉu ne jam ekzistas forumo por tiu temo.

## 1.8 Asocioj

Ankaŭ la diversaj Esperantaj asocioj estas renkonteblaj en la Reta mondo. Tie ni havas TTT-paĝojn de diversaj landaj asocioj de UEA (kies paĝoj tamen ne malofte estas en nacia lingvo); ni havas paĝojn de Sennacieca Asocio Tutmonda, de fakaj asocioj ĉiaspecaj, paĝojn de la Akademio de Esperanto (kun diversaj oficialaj dokumentoj, kaj kun nun ellaborata Akademia Vortaro), kaj kompreneble oni trovas en la Reto ankaŭ la paĝojn de Universala Esperanto-Asocio mem.

Mi povas konstati, ke post plurjara sufiĉe lama rilato al la Interreto, UEA lastatempe viglege Interretigis sin. Ŝajnas eĉ ke la prezidanto de UEA estas unu el la plej fervoraj uzantoj de tiu medio. Oni daŭre retrovas lin en pli-malpli ĉiu dissendolisto kaj diskutgrupo. Sed ankaŭ kritikantoj de UEA trovis sian vojon al la Reto. Al tiuj apartenas la lastatempe populariĝinta Reta gazeto “Libera Folio”, en kiu oni povas legi ĵurnalisme altnivelajn artikolojn ekz. pri la diversaj organizaj krizoj de UEA. Konkurencas tiukampe foje la sukcesa TTT-portalo “Ĝangalo” kun sia novaĵservo - ne nur pri UEA-krizoj kaj aliaj Esperantaj aferoj, sed precipe pri la ĝenerala mondo - kaj ankaŭ kun diskutlistoj, babilejoj, kaj kun multo alia. Ĝangalo estas jam tute propra mondo, en kiu oni povas foruzi multe de sia libera tempo. (Ĝangalo eĉ planas starigi Interretan televidkanalon en Esperanto. Ĉu tiu ambiciega projekto realiĝos, ni tamen ankoraŭ ne scias.)

## 1.9 Enciklopedioj kaj katalogoj

Sur la kampo de ĝenerala informado elstaras ankaŭ la projekto Vikipedio. Ĝi estas Interreta hiperliga enciklopedio, de speco por multaj iom ŝoka. En la Vikipedio oni povas ne nur legi enciklopediajn informojn, sed ankaŭ ilin verki mem. Iasence temas pri eksperimento, kaj ne ĉiuj opinias, ke la eksperimento estas sukcesa. Pro tio, ke ĉiu ajn povas tie skribi pri ĉio ajn, iafoje la informoj estas tro diletantaj aŭ eĉ rekte eraraj. Sed plej ofte eraroj tamen estas rapide korektataj, ĉar tio, kion ĉiu ajn enmetas, same povas ĉiu ajn korekti. Malgraŭ la kritiko ne eblas nei, ke iafoje la Vikipedio estas la plej bona fonto de enciklopediaj informoj, ĉar ĝi estas daŭre ĝisdatigata, kaj pri iuj aferoj oni povas nur en la Vikipedio trovi ĝisdatajn informojn. Notindas, ke la Vikipedio estas multlingva projekto, kaj ke la Esperanta versio estas nur unu el multaj, sed ĝi tamen estas je la naŭa loko laŭ amplekso, post la Angla, Germana, Franca, Nederlanda, Japana, Pola, Sveda kaj Hispana Vikipedioj, sed antaŭ ekz. la Ĉina, Rusa, Korea kaj multaj aliaj lingvoj. Ĉiuokaze, se paroli pri Esperantlingvaj ĝeneralaj enciklopedioj, Vikipedio estas klare la plej grava - ĉar ja la sola. Ĝi enhavas nun jam pli ol 10.000 diverstemajn artikolojn.

Similetan rolon ludas Retaj katalogoj kiel ekz. la Esperanta sekcio de DMOZ, kie oni povas trovi centojn da hiperligoj al paĝoj kaj servoj diverstemaj, kiel ekz. Arto, Butikoj, Distriĝo, Komercio, Komputiloj, Literaturo, Sano, Scienco kaj Sporto. La sama katalogo estas trovebla ankaŭ kadre de Guglo, plu en Esperanto.

## 1.10 Terminaroj

Mi jam menciis la Interretajn vortarojn ĝeneralajn, sed haveblas ankaŭ terminaroj diverstemaj. Menciindas aparte:

- “Komputada Leksikono” de Pokrovskij, elstara kaj modela terminaro
- “Roko kaj Popo”, Popolarmuzika terminaro - de mi mem
- “Hejma Vortaro”, terminaro de hejma uzo de Esperanto, furora ankaŭ libroforme
- “Landoj kaj lingvoj de la mondo” - de mi mem
- “Esperanta franca fakvortaro pri astronomio”
- “Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana”
- kaj multaj aliaj

Eble tamen aldonindas - ĉar ni havas inter ni specialistojn pri terminoscienco - ke la kvalito de tiuj fakterminaroj ne ĉiam estas alta.

## 1.11 Gazetoj

Ankaŭ Esperantaj gazetoj retroveblas en la Reto, iuj el ili eĉ nur tie. Mi menciis unualoke la TTT-paĝojn de “Monato”, kie eblas legi sufiĉe riĉan kolekton de artikoloj malnovaj kaj ankaŭ tute freŝdataj, foje aperantaj Rete eĉ antaŭ ol dissendiĝas la papera “Monato”. Mi jam menciis “Libera Folio” kaj “Ĝangalo”. Ni trovas ankaŭ revuon “Esperanto” de UEA, la elstaran “Ondo de Esperanto”, “La Gazeto” (kun kelkaj elektitaj artikoloj el la papera eldono), “Kajeroj el la Sudo”, kaj multajn aliajn grandajn kaj malgrandajn gazetojn. Aparte menciinda estas la Esperanta versio de la fama gazeto “Le Monde Diplomatique”.

Parolante pri gazetoj ne eblas flankenlasi la elstaran TTT-ejon Kiosko, de Franko Luin. Tie interalie per Esperanta interfacado eblas trovi senkompare riĉan kolekton de ligoj al diverslandaj kaj diverslingvaj gazetoj, precipe ne-Esperantaj. Cetere Kiosko estas nur unu el longa vico de elstaraj Esperantaj TTT-ejoj faritaj de Franko Luin. Pri tiu temo eblus eĉ fari tutan prelegon.

## 1.12 Muziko

Esperanta muziko retroveblas en multaj lokoj en la Interreto: Ĉe “mp3.com” aŭskulteblas specimenoj de pluraj dekoj de Esperantaj muzikistoj kaj muzikgrupoj en la populara formato MP3. (Tamen ĉiuj datumoj ĉe “mp3.com” baldaŭege transloĝiĝos aliloken.) Kolekton de MP3-oj en Esperanto ofertas ankaŭ “Music Express”. Krome multaj Esperantaj artistoj havas kompreneble siajn proprajn TTT-paĝojn, kiel ekz. Kunar kaj la grupoj Kore, Krio de Morto, Persone k.a.

## 1.13 Literaturo

Sur la kampo de literaturo havas elstaran lokon en la Reto la paĝoj de Don Harlow. Tie legeblas arego da plenaj verkoj kaj specimenoj de verkoj, originalaj kaj tradukitaj, kaj la kolekto estas daŭre kompletigata. Alia grava loko estas la paĝoj de Wolfram Diestel, kiu heroe enkomputiligis kaj en-Retigis ekz. la Fabelojn de Andersen (en traduko de Zamenhof), la Faraono (en traduko de Kabe) kaj multon alian. Eble aparte menciindas la Reta ĉeesto de la Sankta Biblio en Esperanto. Ĝi troveblas eĉ en pluraj lokoj, kun diversaj aspektoj kaj aranĝoj. Kredeble la plej bela en-Retigo de la Biblio estas tiu de Franko Luin.

De literaturo ni tuj venas al kampo, sur kiu mi mem nuntempe fervore okupiĝas: *kreado de Esperanta Tekstaro por lingvosciencaj esploroj*. Ĝis nun temas precipe pri kunigado kaj unuecigado de materialo diversloke jam antaŭe havebla en la Reto, sed en formo aŭtomate priserĉebla. La ĝisnunaj rezultoj de tiu projekto (financata de “Esperantic Studies Foundation”) estas paĝoj Rete konsulteblaj. Mi invitas vin viziti tiujn paĝojn, esplorante la tiean serĉilon. La Tekstaro de

Esperanto ampleksas nun ĉirkaŭ 2 milionojn da vortoj, sed mi laboras por multoblige la kvanton per nove skanataj kaj enkomputiligataj tekstoj.

Literaturon oni tamen plej ofte preferas legi papere, sed ankaŭ tiam la Reto povas helpi. En la Reto troviĝas ja ankaŭ diversaj libroservoj, ĉe kiuj eblas mendi librojn. Mi mem uzis la Retbutikon de Flandra Esperanto-Ligo kaj la Retan librokatalogon de UEA, kaj estas pri ili tute kontenta.

#### 1.14 Personaj TTT-paĝoj

Nun ni venas al la plej bunta kampo: la personaj TTT-paĝoj. Da ili ekzistas kompreneble abundo plene nesuperrigardebla. Oni daŭre trovas novajn, kaj novaj daŭre aperas. Tiu speco de paĝoj ekzistas en la Interreto de la unua ekesto de TTT, kaj ili apenaŭ malplipopulariĝis. Kvalite ili varias de plej abismaj ĝis bonegaj. Mi menciis nur kelkajn kun aparte riĉa enhavo de ne nur tute privata intereso:

- “Tekstoj.nl” - paĝaro de Roel Haveman, kun abundo da informoj pri tradukado kaj verkado. Lia kolekto de konsiloj kaj hiperligoj estas nemalhavebla por ĉiu ajn kiu laboras tiukampe.
- La TTT-ejo de Jurio Finkel kun vasta kolekto de literaturaĵoj, komputaĵoj kaj multo alia.
- La Lingvistika Retejo de Ken Miner kun diversaj tre interesaj artikoloj pri lingvosciencaj aferoj.
- La paĝoj de Gunnar Fischer, precipe kun muzikorilata enhavo.
- La paĝoj de Klivo, pri traduko de Anglaj verboj, kamelioj k.a. floroj, klarigoj pri Interretaj terminoj, kaj kun diversaj interesaj artikoloj, el kiuj mi ne povas ne menciiti tiun “Pri Venuso, la Diablo, Jack Chick, kaj la Framasonoj”. Legu ĝin!
- Kaj eble ankaŭ miaj propraj TTT-paĝoj kun iom bunta enhavo povas iun interesi. Temas precipe pri Esperantorilata enhavo, ne nur PMEG, kiun mi jam menciis, sed estas ankaŭ muzikorilata enhavo, kurso pri farado de TTT-paĝoj, k.t.p.

#### 1.5 Blogoj

Lastatempe aperis nova speco de personaj privataj TTT-paĝoj, kiujn oni nomas per la novovorto “blogo”. Ĝi estas origine mallongigo de la Anglaĵo “weblog”, do “TTT-a loglibro” aŭ “Reta taglibro”, “Reta ĵurnalo”. Ĝuste la vorto “ĵurnalo” trafas sufiĉe bone, ĉar tiaj paĝoj varias laŭkaraktere inter publikaj taglibroj kaj ĉiutagaj personaj gazetoj. La vorto “ĵurnalo” ja havas ambaŭ tiujn signifojn. Iuj eĉ plendas, ke estas jam multe tro da blogoj, kaj ke jam fariĝis malfacile trovi seriozajn paĝojn inter ĉiuj blogoj, kiuj babilas pri ĉio kaj jeno, kaj kiuj verve kreas hiperligojn inter si.

Mi tamen trovas la blogojn tre utilaj kaj fascinaj. Se oni elektas kelkajn blogojn, kies aŭtoroj skribas pri temoj, kiuj interesas onin, oni povas ofte tie trovi tre freŝdatajn kaj gravajn informojn, inspirojn kaj ideojn. Ofte la blogoj komentas unu la aliajn, kaj ekestas novspecaj dialogoj.

Kompreneble ankaŭ Esperantlingvaj blogoj ekestis. Mi mem legas kun plezuro la blogojn de Kunar, Gonçalo Neves, Ken Miner kaj Manuel Pancorbo Castro. Precipe agrabla estas tiu de Gonçalo Neves. Li ja estas majstra verkisto Esperanta, kaj tio tuj rimarkeblas ankaŭ en liaj pli-malpli ĉiutagaj blogaj meditaĵoj.

Sola vera malbonaĵo pri blogoj, kaj pri TTT-paĝoj, kaj pri la Interreto entute, kaj ankaŭ pri la miriado de Esperantaj anguletoj kaj angulegoj de la Reto, estas, ke tie troviĝas tiel multe, kaj ke tial oni riskas foruzi en la Reto tro multe da valora tempo. Necesas elekti kaj sarki. Necesas limigi sian Interretan uzon por tie ne komplete malaperi.

## 1.16 Kelkaj elektitaj retpaĝaroj

### a) Ĝeneralaĵoj

<<http://www.google.com/search?hl=eo>>, Guglo, serĉoservo

<<http://www.esperanto.net>>, Multlingva Informcentro pri la Internacia Lingvo

<<http://www.webcom.com/~donh/esperanto.html>>, "Esperanto Access" de Don Harlow.

<<http://ttt.esperanto.org>>, Esperanto.org

<<http://www.esperantoland.org/eo/>>, Esperantoland, novaĵoj, informoj, lingvokursoj

### b) Kursoj

<<http://www.lernu.net/>>, "Lernu": Plurlingva kursejo

<<http://www.cursodeesperanto.com.br/de/index.html>>, (Kurso de Esperanto)

<<http://www.esperanto.de/sprache/kurse/kek/>> ,

<<http://pacujo.net/esperanto/course/>>, Senkosta Esperanto-kurso, diverslingva

<<http://www.esperantoland.org/de/kurs/>>, Kurso ĉe Esperantoland (Esperanto-Kurs)

<<http://www.esperanto.org/espviva/>>, Esperanto Viva

<<http://edukado.net/>>, Servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto)

### c) Gramatiko

<<http://www.bertilow.com/pmeg>>, PMEG: Plena Manlibro de Esperanta

<<http://www.lernu.net/seppik/enhavo.php>>, "La tuta Esperanto" de Seppik

### d) Vortaroj

<<http://purl.org/NET/voko/revo/>>, ReVo (Reta Vortaro)

<<http://homepage.ntlworld.com/edmund.grimley-evans/pivkap>>, Ĉiuj kapvortoj el "La Nova Plena Ilustrita Vortaro

<<http://www.xs4all.nl/~pilger/breo-al3.htm>>, Bazaj Radikoj Esperanto-Esperanto

<<http://perso.club-internet.fr/vivilass/vortaro/index.html>>, "La Vortaro", senpaga programo por Vindozo

<[http://www.akademio-de-esperanto.org/akademia\\_vortaro/](http://www.akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/)>, "Akademia Vortaro"

<<http://dmoz.org/World/Esperanto/Informo/Vortaroj/>>, listo de vortaroj ĉe DMOZ

### e) Novaĵgrupoj k.s.

<<http://groups.google.com/groups?hl=eo&lr=&ie=UTF-8&oe=UTF->



&group=soc.culture.esperanto>, la novaĝgrupo "soc.culture.esperanto"

<<http://groups.yahoo.com/search?query=esperanto&submit=Search>>, Esperanto-rilataj grupoj  
ĉe "Yahoo Groups"

<<http://www.abonu.com/>>, "Abonu.com", dissendolistoj de UEA

#### **f) Asocioj**

<<http://www.akademio-de-esperanto.org>>, Akademio de Esperanto

<<http://www.uea.org/>>, Universala Esperanto-Asocio

<<http://www.esperanto.de/>>, Germana Esperanto-Ligo

<<http://www.esperanto.se/>>, Sveda Esperanto-Federacio

#### **g) Enciklopedioj k.s.**

<<http://eo.wikipedia.org/>>, Vikipedio

<<http://www.dmoz.org/>>, DMOZ (Sistema Katalog retejoj kun aliro al Esperanto)

#### **h) Terminaroj**

<<http://www.iis.nsk.su/persons/pok/Eo/KompLeks/html/KOVRILO.html>>, "Komputada  
Leksikono" de Pokrovskij

<<http://www.bertilow.com/roko/>>, "Roko kaj Popo", Popolarmuzika terminaro

<<http://www.helsinki.fi/%7Ejlsindst/heimvort.html>>, "Hejma Vortaro", terminaro de hejma  
uzo de Esperanto

<<http://www.bertilow.com/lanlin/>>, "Landoj kaj lingvoj de la mondo"

<<http://www.ifrance.fr/berlin/catal/multidic/efastro.htm>>, "Esperanta franca fakvortaro pri  
astronomio"

<<http://mujweb.atlas.cz/Kultura/malovec/MATEM.HTM>>, "Matematika vortaro Esperanta-  
ĉeĥa-germana"

<<http://uea.org/dokumentoj/bib/index.html>>. (Bibliografio de vortaroj)

<[http://uea.org/dokumentoj/terminaroj\\_1980-2002.html](http://uea.org/dokumentoj/terminaroj_1980-2002.html)>

<<http://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/>> (Bibliografio de fakvortaroj)

#### **i) Gazetoj k.s.**

<<http://www.algonet.se/~kallekn/folio/>>, "Libera Folio"

<<http://www.gangalo.com/>>, "Ĝangalo"

<<http://www.esperanto.be/fel/mon/index.html>>, "Monato"

<<http://www.uea.org/revuo/>>, revuo "Esperanto" de UEA

<<http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-ondo.htm>>, "Ondo de Esperanto"

<<http://www.osiek.org/lagazeto/>>, "La Gazeto"

<<http://storm.prohosting.com/jesuo/kajeroj.htm>>, "Kajeroj el la Sudo"

<<http://eo.mondediplo.com/>>, "Le Monde Diplomatique" en Esperanto

<<http://www.algonet.se/~esf/kiosk/espindex.html>>, Kiosko - Gazetoj en la tuta mondo

## j) Muziko

<[http://stations.mp3s.com/stations/10/esperanto\\_êe\\_mp3com.html](http://stations.mp3s.com/stations/10/esperanto_êe_mp3com.html)>, "mp3.com", Esperantaj artistoj  
<<http://www.musicexpress.com.br/Genero.asp?genero=36>>, "Music Express", Esperantaj artistoj  
<<http://elkore.free.fr/esp/index.htm>>, "Kore", rokgrupo  
<<http://www.zb.eco.pl/muzyka/krio/esperant.htm>>, "Krio de Morto", rokgrupo  
<<http://www.bertilow.com/persone/>>, Persone, rokgrupo

## k) Literaturo

<<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>>, Literaturo en la Reto, de Don Harlow  
<<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/texte/bibl/>>, Biblioteko de Wolfram Diestel  
<<http://www.esperanto.nu/upsala/biblio/>>, la Sankta Biblio  
<<http://www.ikso.net/~bertilo/tekstaro/>>, Tekstaro de Esperanto

## l) Retbutikoj

<[http://www.esperanto.be/fel/but/lis\\_serchu.html](http://www.esperanto.be/fel/but/lis_serchu.html)>, Retbutiko de Flandra Esperanto-Ligo  
<<http://www.uea.org/katalogo/>>, Librokatologo de UEA

## m) Personaj paĝoj

<<http://www.tekstoj.nl/esperanto/tradligoj.htm>>, Tekstoj.nl - de Roel Haveman, pri tradukado kaj verkado  
<<http://www.esperanto.mv.ru/ESP/>>, Jurio Finkel, literaturo, komputaĵoj k.a.  
<<http://www.sunflower.com/~miner/>>, La Lingvistika Retejo de Ken Miner  
<<http://www.muenster.de/~kunar/ligoj.htm>>, Gunnar Fischer, precipe pri muziko  
<<http://www4.vc-net.ne.jp/~klivo/>>, Klivo, diversaĵoj  
<[http://www.algonet.se/~inko/index\\_eo.html](http://www.algonet.se/~inko/index_eo.html)>, Franko Luin (Frank Luin)  
<<http://www.bertilow.com>>, Bertilo (retejo de Bertil Wennergren)

## n) Blogoj

<<http://www.livejournal.com/users/kunar/>>, Kunar Fischer  
<<http://periskope.blogspot.com/>>, Periskope, Gonçalo Neves  
<[http://www.sunflower.com/~miner/TAGLIBRO\\_package/taglibro.html](http://www.sunflower.com/~miner/TAGLIBRO_package/taglibro.html)>, Ken Miner  
<<http://bitakoro.blogspot.com/>>, Bitakoro, Manuel Pancorbo Castro

## o) Interlingvistiko/Esperantologio<sup>1</sup>

<<http://www.interlinguistik-gil.de>> ("Gesellschaft für Interlinguistik e.V.", GIL, societo pri Interlingvistiko)  
<[www.esperantic.org](http://www.esperantic.org)> (en la angla kaj Esperanto, "Center for Research and Documentation on World Language Problems", kun multaj ligoj al Interlingvistiko/Esperantologio)  
<<http://www.math.uu.se/esperanto>> (revuo "Esperantologio - Esperanto Studies", EES)  
<<http://htliu.nease.net>> (LIU Haitao, ĉina informadikisto, lingvisto kaj interlingvisto, multaj ligoj)  
<[www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)> (Katalogo de la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno TROVANTO)

---

<sup>1</sup> Aldono de la redaktoro (DB).

## 2 Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne!

### Kelkaj komentoj pri germana artikolo de *Alicja Sakaguchi*

Detlev Blanke

En germana antologio por universitataj germanistoj aperis artikolo de d-rino Alicja Sakaguchi (Mömbris-Brücken/Germanio kaj Poznań-Pollando), en kiu ŝi klopodas argumenti, ke ne ekzistas aparta kulturo de Esperanto kaj ke la lingvaj ekzemploj, ofte menciitaj kiel esperantismoj, nur uzatas de oficistoj de la Centra Oficejo de UEA, resp. de UEA-aktivuloj. Tiuj esperantismoj laŭ ŝi formas specifan “jargonon de UEA”

La artikolo levas kelkajn principajn problemojn kaj misgvidas neinformitojn. Pro tio mi komentas ĝin.

*Sakaguchi, Alicja (2004): Der Jargon des Esperanto-Weltbundes. En: Engel, Ulrich (Eld.): Sprachwissen in der Hochschulgermanistik. Interkulturelle Kommunikation. Referate von den Konferenzen in Karpacz 2001, in Šubice 2002. Bonn: Deutscher Akademischer Austausch-Dienst, [355 p.], p. 323-334*

Por simpligi la prezenton, mi citas la aŭtorinon kiel AS.

#### 2.1 Lingvo “havas”/”ne havas” kulturon

2.1.1 Lige al la demando, ĉu Esperanto (Eo) “havas” kulturon, ŝajne ekzistas baza miskompreno. Ĉu la germana lingvo “havas kulturon”, same la pola, angla, hungara ktp.?

Rigorasence la respondo estas, ke lingvoj en si mem ne “havas” kulturon. *Do sekve ankaŭ Esperanto ne „havas“ kulturon.*

*Metafore* oni tamen ofte diras, ke tiu aŭ jena lingvo havas kulturon, kiel AS mem indikas tion sur p. 332. *Tiam Esperanto ja “havas” kulturon.* Tamen la problemo, estas

a) kiom da kulturelementoj ĝenerale estas ligitaj al Eo kaj

b) kiom da ili estas ligitaj nur al ĝi

Ofte la diskutoj pri la temo estas ĵonglado inter rigora kaj metafora sencoj de tiu konstato.

2.1.2 Ĝenerale estas akceptate, ke lingvo en si mem estas kulturaĵo. Do, Esperanto estas kulturaĵo. Kvankam neniu lingvo en si mem havas kulturon, tamen kulturon ja sendube havas *la lingvo-komunumo*, la parolantaro de lingvo. Ĝi havas/portas, konservas, pludonas sian kulturon aŭ foje eĉ detruas elementojn de ĝi (ekz. la nazioj en Germanio). Tiu kulturo *reflektiĝas kaj konserviĝas en la difinita lingvo* de diversaj grupiĝoj. Tio ekz. povas koncerni jenajn lingve distingeblajn parolantarojn:

- regionlingva (dialekta) parolantaro kun sia kulturo (ekz. la bavara en suda Germanio)
- nacilingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la superregiona germana)
- minoritatlingva parolantaro kun sia kulturo (ekz. la regione limigita soraba en Germanio)
- enmigrintoj (ekz. turkoj en Germanio, ĉinoj kaj aliaj etnoj en Usono ktp.), kiuj ofte loĝas en certaj gettoj aŭ specifaj kvartaloj (diversgrade) kunportas kaj flegas siajn lingvojn kaj kulturojn ktp.

2.1.3 Laŭ tio videblas, ke difinitaj homoj samtempe povas havi diversajn identecojn kun diversaj kulturspecifaĵoj.

Persono *x etne* povas esti germano, *regione* kaj *dialekte* bavaro, *politike* verdulo, *religie* katoliko, ktp. Li/ŝi ankaŭ povas havi la identecon de esperantisto, senti sin eŭropano ktp.

Elementoj de tiuj diversaj kulturmedioj estas aktualigeblaj depende de diversaj kunteksto kaj kondiĉoj: socia, psika, situacia, hommedia kaj aliaj.

Diverslingvaj, diversdevenaj, diverskleraj homoj, kiuj uzas Eon kaj vivas en ĝia lingvo-komunumo, spertas vole nevole la diversoriginan kulturon de tiu lingvo-komunumo, eble eĉ kontribuas al ties riĉigo (ekz. per tradukoj), kvankam tre malsame laŭ maniero, kvalito kaj intenseco.

2.1.4 Depende de la kultura nivelo, kiun havas la unuopaj parolantoj, tiu kulturo kun siaj elementoj povas esti konata, konscie flegata, pludonata al la infanoj, disvastigata ktp. Tio okazas pli mal pli konscie profunde kaj intensive aŭ apenaŭ rimarkeble. Mi ne povas kredi,[sed eble tamen?], ke AS, kiu edukis siajn infanojn ankaŭ esperantlingve, ne pludonis al ili kulturajn valorojn de la Eo-komunumo. Se ŝi vere ignoris la kulturon de la lingvo-komunumo, tio ne signifas, ke la komunumo ne havas ĝin.

Ekz. intelektulo, kiu interesiĝas pri la tradicia kulturo (literaturo, muziko, arto, teatro ktp.), evidente aktualigas pli da kulturaj tavoloj kaj elementoj ol homo, kiu ne interesiĝas pri ĉio ĉi.

Tio kompreneble reflektiĝas en la uzata lingvaĵo de la difinitaj homoj kaj homgrupoj.

Se iuj germanoj ne interesiĝas pri diversaj fakoj, medioj de kulturo, ekz. nek konas Faŭston nek modernan literaturon ktp., ili ne komprenos la specifan leksikon, la aludojn ligitajn al tiuj kulturaĵoj, la kunsencaĵojn (konotaciojn). Ĉu tio signifas, ke la germana lingvo-parolantaro ne konservas, reflektas tiajn kulturaĵojn, ne “havas” kulturon?

2.1.5 Parolante pri tio, ke lingvo (resp. ties komunumo) havas/ne havas kulturon, oni nenion diras pri la kvanto kaj kvalito de tiu kulturo, nek pri la grado de la originaleco.

Se difinitaj parolantoj de Eo ne interesiĝas pri kulturaĵoj konservitaj en Eo (ekz. originala literaturo), nek pri la lingvo-komunumo kun siaj tradicioj, sia strukturo en pasinteco kaj nun, ne sekvas la dinamikon de la lingvo-komunumo, la procezojn, konfliktojn, do la historion k.s., ne partoprenas la aktualan internacian vivon de la komunumo parole kaj skribe, do sekve ne uzas la leksikon ligitan al tiuj fenomenoj, ĉu tio signifas, ke la Esperanta lingvo-komunumo ne disponas pri tiuj fenomenoj?

Facile pruveblas, ke tiuj fenomenoj objektivaj estas konservataj (priskribataj) en la lingvo, ke iliaj specifaj reflektiĝas en ĝi, eĉ se subjektive oni ne interesiĝas pri ili.

Ŝajne Eugen Wüster estis la unua, kiu abunde reflektis pri la lingvo-komunumo en sia Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, Leipzig, 1923-1929; (mi aliloke verkis pri la vortaro, kp. Blanke 1995).

## 2.2 Ĉefaj rilatoj inter lingvo kaj kulturo:

Ĉiu lingvo estas parto de la homa kulturo. Sekve ankaŭ Esperanto.

La homa kulturilata agado reflektiĝas en la lingvo vertikale (agadspecoj) kaj horizontale (regionoj), do ene de difinita medio, en iu fako, organizaĵo ktp. sed ankaŭ en dialekta regiono, nacio (ŝtato), kontinento aŭ internaciskale. Sekve ankaŭ la kulturilata agado de esperanto-parolantoj, resp. la rezultoj de tiu agado, reflektiĝas en la lingvo.

La difinita(j) lingvo(j) por la la homo havas diversajn funkciojn: Per lingvo li/ŝi pensas, komunikas, emocias; akiras, konservas kaj pludonas sciojn, ekkonojn, spertojn ktp. En la plej multaj kazoj por la individuo la lingvo estas grava identigilo. Tio aparte validas rilate al kulturtemoj, sendepende de tio, kiom larĝa aŭ mallarĝa estas nia difino pri kulturo. Tiun funkcion evidente ankaŭ havas Eo.

### 2.3. Komentoj pri kelkaj detaloj de la artikolo:

2.3.1 La “ĵargono” de UEA laŭ AS estas uzata en

- a) la Centra Oficejo de UEA kaj
- b) de la Komitato de UEA (proks. 80 personoj, p. 329/330).

“Ĵargono” ne estas difinita. Kio estus la “neĵargono”? Eble AS celas la speciafan funkciaĵon (Funktionalstil) de administrado ?

Estas konate, ke en ĉiuj ago-medioj uzatas specifaj stiloj (funkciaj stiloj), do ankaŭ en oficejoj de organizaĵoj, en redakcioj, gvidinstancoj ktp. aŭ en familioj. Tio ankaŭ koncernas Eon.

Tamen tiuj stiloj neniam kovras la kompletan uzatan lingvaĵon. Pri la elekto de la stilelementoj decidus la situacio kaj la komunika celo.

2.3.2 La oficistoj de la CO de UEA laŭ AS estas “überwiegend junge Menschen verschiedener, mehrheitlich nicht akademischer Berufe und unterschiedlicher Bildungsgrade, die mit Verwaltungsarbeiten innerhalb des Esperanto-Weltbundes betraut sind und durch gemeinsame Interessen für eine Zeit von meist einigen Jahren zusammengeführt werden...(p. 329: la oficistoj de CO estas „ĉefe junaj homoj de diversaj, plej multe neakademiaj profesioj kun malsamaj klereco-gradoj, al kiuj estas komisiitaj diversaj administraj taskoj interne de UEA kaj kiujn kunigas komunaj interesoj por la tempo de plej ofte kelkaj jaroj...“). Tiu kvalifiko de la oficistoj estas stranga. Ĝi iom sonas, kvazaŭ valorus konsideri nur homojn kun “akademiaj profesioj” aŭ ilin distingi laŭ tio.

2.3.3 Multaj el la menciitaj leksikaj ekzemploj<sup>2</sup> por informitaj esperantistoj pravas la malon de tio, kiun AS volas kredigi. Ili ligiĝas al la historio, strukturo, konceptoj, debatoj ktp. en la komunumo, ne nur en la Centra Oficejo. Tiun lingvaĵon uzas multaj esperantistoj, kiuj estas ligitaj al la lingvo-komunumo kun siaj specifaj, kompreneble ne nur en CO, ne nur en la Komitato de UEA, sed ankŭ ekster tiuj strukturoj. Ofte temas pri vortludoj, frazeologiaĵoj ktp. (pri tio valoras legi Sabine Fiedler 2002 kaj Aleksandr Melnikov 2004).

2.3.4 Kun miro mi legas, ke Eo „wurde von dem polyglotten Augenarzt Ludwig Zamenhof geschaffen“ (p. 323 Eo „estis kreita de la poliglota okulisto Ludwig Zamenhof“). Sur p. 332 ni trovas: „Es (=Eo) wurde zwar von einem Individuum geschaffen...“ („Kvankam Eo estis kreita de unu individuo...“) Nu, la individuo Z. unue kreis *projekton* kaj aktive partoprenis la lingvigon. Sendube. Sed la nuna lingvo estas produkto de la internacia multgeneracia uzantaro. Neniu homo kapablas krei lingvon. Ankaŭ la kolosa lingvo-evoluiga kontribuo de Zamenhof (originalaĵoj, tradukoj, paroladoj, redaktado, eldonado, konsilado kt.) restus nur fikcia kaj sekve vana sen kreskanta parolantaro kun eĥo al liaj laboroj.

2.3.5 AS skribas, ke Eo estas „eine überethnische, überationale Sprache ohne Traditionen, Brauchtum, Lebensstile und Verhaltensweisen, die bestimmten Völkern eigen wäre.

---

<sup>2</sup> Jen la cititaj ekzemploj, kiuj havas fontindikojn en la originala germana teksto:

Esperantujo, diaspora kolektivo, desubismo, desuprismo, Kongresa Universitato, fina venko, finvenkismo, Rondo Familia, lapennismo, zagrebismo, nepivaj vortoj, ĝisostulo (=tre/tro fervora ortodoksa esperantisto) nepagipovaj landoj, dumvivuloj (=dumviva membro de UEA), Manifesto 2000, Esperanto-Civito, Konstitucia Ĉarto de la Esperanta Civito; la kromsignifoj (konotacioj) ligitaj al lokoj kiel Frostavallen, Hamburgo, Raŭmo [kun raŭmismo, praraŭmismo de Zamenhof, Manifesto de Raŭmo], Tireso [lp. 2.3.8]; vortludo kiel “ni vosu nian sulkon” (=ni fosu nian sulkon + Manifesto de Voss); mallongigoj kiel E-o, ZEO, CO-oficistoj, UEA-delegito, LKK, IJK; vortludoj kiel Ŝulperanto, Centra Ofuŝejo, Espeŭranto (=Esperanto + Eŭropo), retejo – ejeto; verboj kiel rekotizi, pioniri, strategii.

Jeder Esperantobenutzer gehört bereits einer bestimmten Volksgruppe an und er kann sich mit einer bestimmten ethnischen Kultur und Religion identifizieren“ (323: „...Eo estas transetna, transnacia lingvo sen tradicioj, folkloro, vivostiloj kaj kondutmanieroj, kiuj karakterizas difinitajn popolojn. Ĉiu uzanto de Eo jam apartenas al difinita popolgrupo kaj povas identiĝi kun difinita etna kulturo kaj religio“). Kiel dirite, Eo en si mem ne “havas“ tion kaj jenon, nek tradiciojn, vivstilon, kondutmanieron ktp. Sed la lingvo-komunumo ja havas, kvankam ne homogene, ne unuece.

Ke Eo-uzanto apartenas al diversaj grupiĝoj kaj identiĝas kun ties diversaj kulturoj (religioj ktp.), neniel pruvas, ke ne ekzistas esperantista identeco kun siaj specifaĵoj. Ĉiu homo povas aparteni al diversaj kulturoj samtempe, kiel mi jam montris sub 1.2.

2.3.6 AS asertas „es wird allgemein angenommen, dass jede menschliche Sprache eine bestimmte Kultur reflektiert,, (p. 323 „[...]oni ĝenerale supozas, ke ĉiu homa lingvo reflektas difinitan kulturon“). Kiu estas „oni“ ? Kiu ĝenerale supozas tion? Kiun „difintan“ kulturon reflektas la germana, la angla, la franca ktp.? Ĉiam enestas grandegaj partoj de aliaj kulturoj, de la monda kulturo. Kiun „difinitan kulturon“ reflektas la franca lingvo de francparolanto el Malio, iun etnan lingvon aŭ la francan? Lingvoj principe povas reflekti diversajn kulturojn, povas konservi elementojn de alipopolaj kulturoj, de la monda kulturo ktp. La germana kapablas reflekti diversajn kulturojn, se ili estas bone esprimitaj tradukitaj/ priskribitaj en la germana. Bone germane parolanta turko ja povas reflekti en la germana pri turkaj tradicioj. Kompreneble necesas klarigi nekonatajn nociojn, enkonduki novajn esprimojn aŭ transpreni ilin rekte el la fonto-lingvo (t.n. realaĵoj, pri japanaj realaĵoj en Eo kp. ekz. “Japana Enciklopedieto“). Kvankam la lingvo-kategorioj de la difinita lingvo ja influas la pensadon, sed ĝi ne strikte kaj sklave determinas ĝin.

2.3.7 Laŭ mi la profunda eraro en la pensado de AS estas, ke ŝi ligas la kulturon al la lingvo kaj ne al la lingvo-komunumo. Tio montriĝas en jena demando: “Kann überhaupt eine neutrale Zweitsprache, die mehrere nationale Sprachen und Kulturen überschichtet, eine eigene Kultur entwickeln“ (323, “[...]Ĉu entute neŭtrala dua lingvo, kiu supertavoligas plurajn naciajn lingvojn kaj kulturojn, povas evoluigi propran kulturon?”). Kompreneble la lingvo mem ne povas evoluigi tian kulturon, sed ja la lingvo-komunumo kapablas fari tion.

2.3.8 AS citas tekston de Humphrey Tonkin<sup>3</sup>, kie li aludas al diversaj lokoj historie gravaj por Eo, kiun eksterulo (Außenstehender) ne komprenas. Nu, mi komprenis la tekston. La tekston komprenas tiuj, kiuj konas la historion de la lingvo-komunumo el la lastaj jardekoj, de la 50-aj jaroj ĝis nun. Simile rilatas kono/nekono al difinitaj kulturaĵoj kaj aludoj en naciaj kulturoj: Ankaŭ germano ne konas la lingvajn aludojn pri iu ajn temo, se li/ŝi ne konas la aluditajn fenomenon.

Ankaŭ la mondliteraturon oni ja devas koni, por kompreni difinitajn aludojn.

Konantoj de “Hamleto” kaj de lia fama monologo “esti aŭ ne esti” komprenas la aludojn ĉe parafrazoj kiel “nesti aŭ ne nesti”, “kongresi aŭ ne kongresi”, “progresi aŭ ne progresi”, “trinki aŭ ne trinki”, “sinki aŭ ne sinki” ktp. laŭ la modelo x-i aŭ ne x-i. Nekonantoj de tiu monologe ne komprenas la aludojn, kompreneble.

2.3.9 Ke la cititaj frazoj de Tonkin kun aludoj al Montevideo, Raŭmo, Tireso, Hamburgo „dienen der Verschlüsselung der Kommunikation gegenüber der „Außenwelt“ und der Identifikation von Eingeweihten“ (p. 327 “[...]servas al la ĉifrado de la komunikado kontraŭ la ‘ekstera mondo’ kaj al la identiĝo de informitoj”) vere estas stranga aserto.

Por kiu “ekstera mondo” Tonkin ion “ĉifras” ? Mi ja komprenis, pri kio temas. Kaj multaj komprenus, ĉu AS ne ? La teksto mem estas manifestiĝo de kulturo kaj aludas al tradicioj.

En ĉiu lingvo oni fariĝas informito, se oni legas pri aŭ partoprenas/is la eventojn. Kompreneble, la diversaj idealoj, la klopodoj de la movado (espero pri certagrada oficiala akceptiĝo de Eo, almenaŭ

---

<sup>3</sup> „Ni bezonas pliajn Montevideojn, kaj Raŭmo neniel ebligis tion, kvankam Tireso eble jes; sed ĝi kondukis al Hamburgo” (Tonkin en „Esperanto” 11/2001)

disvastigo k.s.), simboloj, sintenoj ktp. „kann nicht als ein Gemeingut sämtlicher Esperantisten gelten (330 „[...] ne povas esti rigardataj komunaĵo de ĉiuj esperantistoj“). Kompreneble ne. “La” movado ne ekzistas kiel klare konceptebla fenomeno. En la movado ekzistas tre diversaj grupiĝoj, tendencoj kun diversaj ideoj, idealoj, celoj, agoj ktp. Tial estus pli bone paroli pri lingvo-komunumo. Mi povus citi multajn sintenojn, ideojn, idealojn, sciojn, celojn ktp., kiuj ne estas komunaĵo de ĉiuj germanoj, eĉ ne tiuj de mia najbaro kaj mi.

## 2.4 Kio apartenas al la kulturo de Eo?

En tabelo sur p. 331/332 AS mencias diversajn “Teilbereiche der Kultur“ (partoj de la kulturo). La tabelo sugestas, ke iuj subpartoj de la kulturo apartenas al etnaj lingvoj kaj al Eo, aliaj ne. Kiel menciite, kulturo estas ligita al lingva komunumo kaj ne al lingvo.

En la tabelo de AS pri la subpartoj de kulturo mankas scienco, ĝenerale konceptata kiel parto de la homa kulturo.

Semantike proksimas “allgemeine Meinungen” (ĝeneralaj opinioj), “Ideale” (idealoj), “Werte” (valoroj). Kio estas la diferenco inter “Gewohnheiten” kaj “Gepflogenheiten” ? Ambaŭ signifas “kutimoj”, do temas pri plenaj sinonimoj.

Almenaŭ etkvante eĉ ekzistas specifaj pentraĵoj (ligitaj al la simboloj, Zamenhof k.s.), skulptaĵoj (kun Zamenhof, kun stelo k.s.), muziko (kantoj: ne nur la himno).

Male al AS laŭ mi en Eo (=la komunumo) troviĝas certaj kutimoj, antaŭjuĝoj, stereotipoj, sociaj reguloj, tradicioj, sintenoj (ekz. pri senperfortaj internaciaj rilatoj, lingva samrajteco) .

Se mi rajtus subkompreni, ke per la sintagmo „en Esperanto ekzistas/mankas“ AS metafore celas diri „en la lingvo-komunumon de Eo ekzistas/mankas kulturo“ fariĝus pli klare, kion ŝi celas. Kaj la refuto eĉ pli necesa.

Sed tion ŝi evident ne celas asertante ke “...Esperanto...ist aber kein Träger einer Kultur” (332 “[...]sed Esperanto ne estas portanto de iu kulturo). Denove ŝi substrekas la bazan konfuzon.

## 2.5 Konklude

Parolante pri tio, ĉu Eo havas/ne havas kulturon, oni klare distingu inter lingvo kaj la parolkomunumo. Tio helpas eviti konfuzojn.

Cetere, evidente nevole AS tamen pruvas, ke la vivo de la lingvokomunumo de Eo tre specife reflektiĝas en la lingvo. Espereble tiu ekkono restos en la memoro de almenaŭ iom informitaj kaj bonvolemaj germanaj legantoj, kiuj ignoras la kontraŭdirajn kaj rekte malĝustajn asertojn kaj argumentojn.

Tamen, ĉe (tro ofte troveblaj) antaŭjuĝemaj germanaj legantoj eble restos la aserto, ke “Esperanto ne havas [propran] kulturon”. Tion ja neinformitaj homoj daŭre distrumpetas. Ĉu tion aldone ankaŭ faru interlingvistino, kiu devus scii pli bone kaj kiu neniam forgesas substreki sian akademian kompetentecon?

Fakte entute restas malklara la celo de la publikigaĵo.

## Literaturo

Blanke, Detlev (1995): La "Enciklopedia Vortaro" de Eugen Wüster. En: Chrdle, Petr (Red.,1995): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Prelegkolekto de la unua Simpozio de la Akademio de Esperanto, Prago, 1994-07-07/14. Dobrichovice (Prago): KAVA-PECH, p. 41-56.

Fiedler, Sabine (2002): Esperanta frazeologio. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 185 p.

Mel'nikov, A[leksandr] S[ergejevič] (2004):. Lingvokul'torologiĉeskije aspekty planovykh meždunarodnykh jazykov (na fone etniĉeskich jazykov). Rostovskij Gosudarstvennyj Universitet, Rostov-na-Donu 2004, 632 p.

### 3 Pri la eŭropa lingvo-problemo vidpunkte de irlanda diplomato

#### Recenzo de Sabine Fiedler

*Seán Ó Riain (2001): The EU and the Irish Language: Identity and Linguistic Diversity. An Chéad Chló, 46 p.*

La aŭtoro de la dulingva (irlandgaela-angla) broŝuro estas kompetentulo pri fremdlingvoj kaj lingvopolitiko el du perspektivoj. Ó Riain, une, skribis sian doktorigan disertacion pri komparo de lingvopolitiko en Irlando kaj Kebekio en 1985 en Trinity College Dublino. Due, pro sia laboro kiel diplomato, kiu kondukis lin al Aŭstrio, Aŭstralio, Polando kaj ekde 2001 al la Irlanda Ambasadejo en Berlino, li persone kaj praktike spertas la gravecon de lingvaj demandoj.

La studaĵo enhavas priskribon de la nuntempa komunika sistemo de Eŭropa Unio. Surbaze de faktoriĉa materialo la aŭtoro pruvas la ekziston de lingva problemo en Eŭropo. La ĝenerala uzado de la angla, kiun multaj opinias akceptebla solvo, laŭ Ó Riain prezentas maljustan kaj tial nekontentigan manieron de komunikado. Ĝi starigas la sekvajn demandojn:

- (1) La uzado de la angla prezentas grandan avantaĝon por la 16% da eŭropaj civitanoj, kies gepatra lingvo estas la angla kaj por parolantoj de parencaj lingvoj, kiel la germana, nederlanda, dana kaj sveda kompare al ĉiuj aliaj eŭropanoj. Ĉu tia ordo estas akordigebla kun la principo de egalaj ŝancoj, sur kiu longtempe baziĝas politika stabileco en Eŭropo?
- (2) Ĉu la uzado de etna lingvo kiel *lingua franca* en Eŭropo harmonias kun la politiko de EU por subteni lingvan egalecon? Ĉu la fakto, ke pli ol 90% da eŭropaj junuloj lernas la anglan prefere ol la lingvoj de siaj najbaroj, kontribuas al lingva diverseco en Eŭropo?
- (3) Ĉu la uzado de lingvo kies denaskaj parolantoj ĉefe loĝas ekster Eŭropo povas helpi plifortigi eŭropan identecon? Ĉu ĝi ne, kontraŭe, kondukas al kreskanta superrego de la usona kulturo?
- (4) Por atingi lingvonivelon egalan al denaskuloj oni bezonas aŭ eksterordinaran prilingvan talenton aŭ jarlongan restadon en eksterlando. Ĉu tia plia angligado de Eŭropo ne subtenas privilegiojn de eŭropaj elitoj estantaj sufiĉe talentaj aŭ riĉaj atingi tiun nivelon?

La angla kiel *lingua franca* en Eŭropo laŭ la aŭtoro respegulas potencostrukturojn, la principon, ke la reganto havas la rajton decidi kaj pro tio ĝi ofendas la principon de lingva egaleco.

Ó Riain pro tio proponas alternativon: komunikadon per interetna lingvo – Esperanto. Liaj argumentoj enhavas faktojn pri la nuntempa sukcesa uzado de la lingvo (kiel literatura lingvo – p. 19), pri la lernfaciliga valoro de Esperanto (p. 23).

La aŭtoro postulas objektivan kaj scian analizon pri ebla apliko de Esperanto en EU. Tradukoj, laŭ li, povus efektiviĝi komunikadon, plifortigi eŭropan identecon kaj ne laste malaltigi la kostojn. Antaŭ ĉio tiu solvo garantius egalrajtan komunikadon kaj povus eĉ doni ŝancon al lingvoj, kiel la kataluna, la kimra kaj ankaŭ al la gepatra lingvo de la aŭtoro, la irlanda.



Tutlibrete la leganto sentas inter la linioj, ke por Ó Riain urĝas la celo konservi la lingvan diversecon en Eŭropo ankaŭ pro la sorto kiun la irlanda suferis en la pasinteco.

La broŝuro enhavas ampleksan bibliografion pri la temo, du suplementojn pri Esperanto (prilingvan skizon kaj resumon pri etimologio) kaj interesan tabelon, kiu analizas la komunikan sistemon de EU laŭ 10 kriterioj kompare al aliaj internaciaj komunikaj sistemoj.

Entute, la libreto prezentas valoran materialon pri la nunaj problemoj de komunikado en Eŭropo kaj proponon pri ties solvado, kiu favore impresas pro sia logika kaj faktoriĉa karaktero.

## 4 Bibliografioj kaj bibliotekoj

### 4.1. Elektronika Bibliografio de Esperanto-Artikoloj (EBEA) de Bernhard Pabst

La germano *Bernhard Pabst*, konata i.a pro siaj klopodoj subteni terminologian agadon per la eldono de la bulteno “Terminoteko” (kp. IpI 17 [2/1996] kaj pro diversaj esperantologiaj eseoj, kompilis ege valoran bibliografion. Ni prezentis ĝin en la aktoj de la 12-a konferenco de GIL :

*Pabst, Bernhard (2003) : EBEA - Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto. En: Blanke, Detlev (Red.): Plansprachen und elektronische Medien. Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 9. Berlin: GIL, p. 64-76*

La sama teksto troviĝas en la reto: [www.interlinguistik-gil/ebealink.html](http://www.interlinguistik-gil/ebealink.html)

Antaŭ nelonge la bibliografio estis transprenita en la retejon [www.EsperantoLand.de/ebea](http://www.EsperantoLand.de/ebea) , kiun prizorgas Louis-Ferdinand von Wunsch-Rolshoven [lu@Esperantoland.de](mailto:lu@Esperantoland.de)

Red.

#### Jen la klarigoj de *Bernhard Pabst* pri sia bibliografio:

La bibliografio aktuale enhavas indikojn pri proksimume 8000 gazetaj artikoloj. Pliaj 7000 estas prilaborataj kaj sekvas iom post iom; la artikoloj publikiĝis en diversaj gazetoj, en Esperanto aŭ naciaj lingvoj, ekde la jaro 1890 ĝis hodiaŭ. Temoj estas diversaj aspektoj de Esperanto, ĝia historio, movado kaj komunumo, specife interalie

- \* terminologio
- \* etimologio
- \* frazeologio
- \* gramatiko
- \* instruado kaj pedagogiko
- \* denaskismo
- \* biografioj de konataj Esperanto-parolantoj
- \* historio de Esperanto-organizoj
- \* kongresoj

Apenaŭ aperas literaturo kaj poezio, malmultas ĝenerale scienca literaturo en Esperanto. Ne enestas libroj (monografioj). Tiuj estas troveblaj en la datumaro TROVANTO de la Aŭstria Nacia Biblioteko (<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen> )

La bibliografion kunmetis el pluraj partoj kaj pluflegas Bernhard Pabst; bonvolu sendi viajn komentojn, korektojn kaj aldonproponojn al [Bernhard.Pabst@gmx.de](mailto:Bernhard.Pabst@gmx.de) La datumbazon kaj la serĉadon programis Gabi Rothe; leterojn pri la tekniko bv. sendi al [ebea@esperantoland.org](mailto:ebea@esperantoland.org).

### **Kiel serĉi?**

Enmetu la serĉvortojn en la kampojn - laŭ via deziro tute supre por serĉi en ĉiuj kampoj aŭ sub la linio en la dezirata kampo. La serĉo ignoras majusklojn aŭ minusklojn kaj serĉas viajn signojn ankaŭ en vortoj - per "Lins" vi trovos ankaŭ "Korzlinskij". Per enmetado de "Lins," vi trovos nur "Lins, Ulrich" kaj "Lins, Marko". Per "denask" vi trovos "denaskuloj", "denaskismo", "denaska" ktp.

### **Specialaj signoj:**

Ni rekomendas serĉi laŭ la baza litero aŭ laŭ parto de la vorto: por trovi "Støp-Bowitz" serĉu eble "Bowitz". Enmetu Esperanto-signojn per x, do cx por ĉ, ux por ŭ ktp.

La rezulto estas ordigita laŭ la eldonjaro, plej malnovaj artikoloj unue. La artikoloj aperas en grupoj de po dek - supre kaj malsupre de la rezultopaĝo vi povas salti al la posta aŭ antaŭa dekopo. Oni povas serĉi en ĉiuj kampoj:

Aŭtoro

Titolo

Temo

Fonto

Rimarko

en la jaroj de.... ĝis....

## **4.2 Bibliografio de Modern Language Association of America (MLA)**

### **Barbara Chen**

#### **Antaŭrimarko de Humphrey Tonkin**

Lastatempe, Detlev Blanke kaj mi liveris al Modern Language Association (Asocio pri Modernaj Lingvoj, MLA) en Novjorko donitaĵojn pri 480 novaj verkoj pri Esperanto kaj interlingvistiko, ĉefe el la jaro 2004.

Temas pri libroj kaj artikoloj pri lingvistikaj kaj literaturaj temoj iel rilataj al Esperanto kaj aliaj planlingvoj.

Tian kompilaĵon ni faras pri la antaŭa jaro ĉiun januaron.

La detalaj donitaĵoj pri ĉiu verko aperos en la "Internacia Bibliografio de MLA" la plej granda datenobazo pri literaturo kaj lingvistiko en la mondo -- en kiu Esperanto estas traktata same science kiel ĉiuj aliaj lingvoj.

La bibliografio, kiu aperas en papera formo ĉiujare kaj estas konsultebla en elektronika formo tra kvardek jaroj (ekde 1963), estas nepre la plej bona fonto de bibliografiaj informoj facile alirebla fare de esperantologoj.

Kvankam ĝi troviĝas en ĉiu granda biblioteko en Usono kaj Kanado, ĝi estas malpli konata en la cetera mondo. Ni klopodas donigi al ĝi pli da atento, kaj konvinki bibliotekojn en eksterlando aboni ĝin, se ili ne jam faras tion. Se ni tiel helpos, ni plisekurigos nian pozicion ĉe la Bibliografio.

Se vi pretas interveni kun rekomendo al via biblioteko, mi povas liveri al vi elprinteblan pli detalan prezenton de la tuto aŭ en la angla aŭ en Esperanto.

*Humphrey Tonkin* ( [tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu) )

(La angla teksto pri la bibliografio aperis en “Interlinguistische Informationen” 14(2005) 54[1/2005], p. 3-5, Red.)

\*\*\*\*



La Internacia Bibliografio de MLA (MLA International Bibliography) liveras laŭ-teman aliron al libroj kaj artikoloj aperigitaj en modernaj lingvoj, literaturoj, folkloro kaj lingvistiko. Ĝin kompilas la anoj de la Bibliografia Inform servo ĉe la oficejo de MLA en Novjorkurbo kun kunlaboro de pli ol 120 kontribuantoj-bibliografoj en Usono kaj eksterlande. Aktuale la datenbazo konsistas el pli ol 1,7 milionoj da registroj; oni aldonas proksimume 66.000 registrojn jare.

### **Temogamo**

La bibliografio kovras literaturon el la tuta mondo – Afriko, Azio, Aŭstralio, Eŭropo kaj Norda kaj Suda Ameriko. Folkloron reprezentas popolaj literaturo, muziko, arto, ritoj kaj kredosistemoj. Materialo pri lingvistiko kaj lingvoj varias: ekde historio kaj teorio de lingvistiko, kompara lingvistiko, semantiko, stilistiko kaj sintakso, ĝis tradukado. Aliaj temoj estas i.a. teorio kaj kritiko, dramarto (filmo, radio, televido, teatro), kaj la historio de presado kaj eldonado.

Verkoj pri literaturo transdonita buŝe, prese aŭ per aŭdvidaj medioj, kaj pri homa lingvo natura kaj inventita (ekzemple Esperanto, aŭ komputilprogramaj lingvoj kiuj montras karakterizojn de homa lingvo) estas taŭgaj por la Bibliografio. Ni ankaŭ kovras materialon pri la historio, teorio kaj praktiko de universitatnivela instruado de lingvoj, literaturo, retoriko kaj verkado, inkluzive de profesiaj kaj administraj demandoj. Verkoj pri temoj kiel ekzemple estetiko, homa konduto, komunikado, kaj informprilaboro aperas nur se ili traktas homajn lingvon aŭ literaturon. Ne estas limigoj pri historia periodo se temas pri lingvoj, sed ĉe literaturo oni ne enmetas verkojn, kiuj traktas ekskluzive klasikan grekan aŭ latinan literaturon.

### **Fontoj**

Por krei nian datenobazon, indeksantoj trarigardas plurajn specojn de eldonaĵoj, inkluzive de revuoj (presitaj kaj elektronaj), serioj, kaj libroj (presitaj kaj elektronaj).

Vortaroj, katalogoj, manlibroj, bibliografioj, indeksoj kaj aliaj konsultiloj, kaj same laborpaperoj, konferencaj referaĵoj, kaj aktoj, aperas. Literaturaj verkoj kaj tradukoj estas normale ekskluzivitaj, krom se ili estas akompanataj de nova kritika aŭ bibliografia apogaro aŭ se ili estas bazitaj je nove establita aŭtoritata teksto. Recenzoj de literaturaj kaj sciencaj verkoj ne aperas. Leteroj al redaktoroj, nekrologoj ktp. aperas nur se ili signife kontribuas al literatura, lingvistika aŭ folkloro scio. Neeldonitaj doktoraj disertacioj ne aperas, sed oni ja listigas resumojn el Dissertation Abstracts International. Instrumetodikaj lernolibroj, manlibroj kaj antologioj, kaj lernprogramoj kaj gvidiloj pri instrutemoj, aperas; sed kursprogramoj, lecionplanoj kaj meminstruiloj ne.

Retaj eldonaĵoj estas notataj per la esprimo “online resource” (reta rimedo) kaj, depende de la eldonmetodo povas listiĝi kiel ajna eldona tipo.

Oni trarigardas ĉiujare pli ol 4.400 revuojn, kaj librojn el pli ol 4.000 eldonejoj. La gvidlibro pri periodaĵoj (Directory of Periodicals), kiu estas parto de la elektrona abono de la Bibliografio, liveras aldonajn informojn pri la kovrataj revuoj, ekzemple titolvariaĵojn, redaktorojn, ret- kaj abonadresojn, retpaĝarajn adresojn, temogamojn, kaj detalojn pri prezento de manuskriptoj por eventuala eldono.

## Lingvoj traktataj

Kvankam la plimulto de la indeksataj revuoj estas anglalingvaj, almenaŭ sesdek pliaj lingvoj reprezentigas en la indekso, inkluzive la francan, hispanan, germanan, rusan, portugalan, norvegan, kaj svedan. La indeksita materialo venas el la tuta terglobo: temas pri vere internacia kovrado.

## Datoj kovritaj

1963 ĝis hodiaŭ. Krome, la indeksado de revuoj JSTOR komenciĝas ĉe la komenco de la koncerna revuo. Ekzemple, kovrado de PMLA, la scienca revuo de MLA, ekas je la jaro 1884. Retrotransformo de la presitaj volumoj de 1926-1962 en la datenobazon daŭras, kaj oni antaŭvidas kompletigon iom antaŭ la fino de la jaro 2005.

## JSTOR kaj Bibliografio MLA

En oktobro 2001, oficistoj de MLA International Bibliography komencis indiksi artikolojn en la lingva kaj literatura kolekto JSTOR, uzante CIFT, la klasifan sistemon de la Bibliografio. Aldono de temo-aliro al la plena teksto permesos al uzantoj de JSTOR pli efike traserĉi ĝian enhavon. MLA komencis inkluzivi indeksadon kaj ligojn JSTOR en siajn elektronajn bibliografiajn varojn en aprilo 2003. En bibliotekoj, kiuj abonas JSTOR, uzantoj povos transiri senĝene de citoj en la elektrona Bibliografio MLA al la plena elektrona teksto. MLA ankaŭ alligas okdek-ok antaŭe indeksitajn revuojn ne inkluzivitajn en la lingvan kaj literaturan kolekton.

## Kial serĉado en Internacia Bibliografio MLA estas pli bona ol serĉi per Google?

- La Internacia Bibliografio MLA enhavas pli ol 1,7 milionojn da registroj, kiuj specife rilatas al lingvoj kaj literaturo. Materialo el aliaj fakoj, kiel ekzemple biologio aŭ politikologio, ne aperas en ĝi.
- Librojn, eseerojn, revuojn, bibliografiojn kaj elektronajn eldonaĵojn trarigardas profesiaj indeksistoj kaj fakuloj cele al krei listigon de materialo kiel eble plej kompletan.
- Nia datenaro estas ekzakta kaj fidinda ĉar ĉiu libro aŭ artikolo estis ekamenita kaj indeksita de vera homo.
- La kovritaj eldonaĵoj estas de konataj eldonistoj el multaj landoj.
- Ni uzas daŭre kontrolatan terminprovizon por niaj temotermoj, tiel ebligante al uzantoj pli elĉerpan traserĉon de la faka literaturo.
- Ĉiu registro enhavas la informojn bezonatajn por pretigi bibliografion kiel parton de esplorprojekto.

Barbara Chen  
Direktoro de la Bibliografia Informservo  
Asocio pri Modernaj Lingvoj MLA  
(tradukita de Humphrey Tonkin)

*Bibliotekoj kiuj interesiĝas pri abono de la Bibliografio turnu sin en la angla lingvo al la verkinto Barbara Chen ĉe Modern Language Association, 26 Broadway, New York, NY 10004-1789, Usono, aŭ en Esperanto al Humphrey Tonkin, Mortensen Library, University of Hartford, West Hartford, CT 06117, Usono.*

### 4.3 Kolekto en la universitata biblioteko de Amsterdam

**Wim Jansen**

La biblioteko de la Universitato de Amsterdamo posedas kolekton de libroj kaj gazetoj en kaj pri Esperanto, kiu nombras pli ol 3000 titolojn.

Parton de tiu stoko konsistigas la libraro de la landa asocio 'Esperanto Nederland', kiun la universitato mastrumas por ĝi.

Post longa laboro, la tuta kolekto estas nun katalogita, kaj rete konsultebla. La adreso de la libere alirebla katalogo estas: <http://opc.uva.nl>. De la bonveniga paĝo vi povas elekti inter nederlandlingva kaj anglalingva daŭrigoj. Alklaku la supran ligan 'Catalogus van de Universiteit van Amsterdam' aŭ 'Catalogue of the Universiteit van Amsterdam' por atingi la elirpaĝon por viaj katalogaj esploroj. En la serĉlinio 'zoeken' aŭ 'search' tajpu la du mallongigojn 'tac esp' (sen citiloj, sed kun unu interspaco) kaj konfirmu (tac esp signifas 'taalcode Esperanto', t.e. 'lingvokodo Esperanto'). Responde vi devus ricevi la komunikon pri 3104 trafoj, kiu estas la E-kolekto, ekrane trairebla en sia tuta amplekso. Anstataŭ tajpi 'tac esp' vi povas uzi la indikitajn serĉkriteriojn, kaj tuj serĉi laŭ titolo, aŭtoro, ktp. De ĉiu trovita titolo vi trovos la aŭtoro(j)n, eldoniston, eldonjaron, bindmanieron, eventualan serian apartenan, referencnumeron, fizikan situon de la volumo kaj informojn pri la prunteblo kaj disponeblo.

### 4.4 La kolekto de Károly Fajszí en hungara biblioteko

*Károly Fajszí* estis konata esperantisto en la mondo. Okaze de lia forpaso aperis pri li nekrologo en la revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario "Hungara Fervojista Mondo", 2004/1. Károly Fajszí ekde la 60aj jaroj kolektis riĉegan materialon. Li publikis libroforme la Volumon I. de la katalogo de sia kolekto en la jaro 1991<sup>4</sup>. Tiu enhavas bibliografian priskribon de 5200 libroj.

La Fajszí-Kolekton aĉetis la Hungara Ministerio pri Kulturo. Poste la Ministerio komisiis la Landan Fremdlingvan Bibliotekon, zorgi pri la Kolekto. Ĝi enhavas pli ol 10 000 esperantlingvajn librojn, pli ol 1000 binditajn periodaĵojn krome ankaŭ alilingvajn eldonaĵojn pri Esperanto kaj pri aliaj planlingvoj.

La Biblioteko eldonos Volumon II-an de la Katalogo de la Fajszí Kolekto pri la ankoraŭ nekatalogitaj verkoj. La datumojn oni aldonos al la datumbazo de la Biblioteko, do estos eble serĉi ankaŭ ilin, je la komputila datumbazo [www.oik.hu](http://www.oik.hu)

La libroj registritaj en Volumo I. de la Fajszí kolekto estas jam serĉeblaj ankaŭ tie. Librojn el la Fajszí Kolekto oni povas uzi en la ĉefa Legosalono, eĉ pretigi kopiojn.

La Fajszí Kolekto estas vizitebla nur post interkonsento (tel. +36 (1) 31 82 772).

La Fajszí-Kolekto troviĝas sur la galerio de la ĉefa Legosalono.

(Laŭ teksto de D-ro E. Dudich)

### 4.5 Pri bibliotekoj kaj arkivoj en Herzberg

En la jaro 2004 en Herzberg/Harcmontaro (Germanio) kreiĝis la "Interkultura Centro Herzberg", ICH. Ĝi baziĝas je la iniciato de kelkaj esperantistoj el Herzberg, unuavice de Peter Zilvar, kiu estas la komisiito de GEA por klerigado. En la Centro ankaŭ laboras la hungara diplomita instruistino de Esperanto (studintino de Prof. István Szerdahelyi), Zsófia Kóródi. ICH oficiale fariĝis la klerigejo de GEA kaj estas rigardata "Kulturcentro de UEA".

---

<sup>4</sup> Kp. Pataki-Czeller, Mária (1991): Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajszí Budapest. Libroj. Parto I. Budapest: Országos Idegennyelvű Könyvtár, 542 p.

La Centron konsistigas kelkaj bone ekipitaj ĉambroj, ampleksa biblioteko (pli ol 5000 libroj), diversaj kolektoj (pli ol 100 KDoj, 160 vidbendoj, kasedoj ktp.), interreta konekto, kaj diversaj aliaj modernaj teknikiloj. Pro la bonegaj rilatoj de ICH al la urbaj instancoj ankaŭ eblas uzi salonojn de la biblioteko. ICH ofertas tra la jaro riĉan programon de faka, lingva kaj interkultura klerigado, kiun realigas konataj fakuloj el Germanio kaj el eksterlando.

Unu el la faka seminarioj estis dediĉita al “Bibliotekoj kaj arkivoj”, temo tre grava sed ne sufiĉe atentata. Ekzistas kreskanta kvanto da privataj bibliotekoj, kies posedantoj foje sukcesas aligi siajn kolektojn al ŝtataj aŭ asociaj instancoj. Tio tamen nur malofte realiĝas kaj ĝenerale tute ne estas sufiĉe frue pripensita. La estonto de la kolektoj evidente multe dependas de unuopaj personoj. Kion tiuj bibliotekoj havas komune, kio distingas ilin? Kiujn problemojn frontas la posedantoj resp. prizorgantoj? Kiel certigi la estontecon de ofte tre valoraj kolektoj? Kiel kompili katalogojn, eble helpe de la reto? Tre ofte oni nur pensas pri la kolektoj de libroj kaj revuoj, sed ne sufiĉe atentis la arkivaĵojn (dokumentoj diversspecaj, korespondaĵoj, kartaroj kaj sliparoj ktp.). Pri tiaj temoj de 8-a ĝis 10-a de aprilo 2005 seminariis 15 partoprenantoj de speciala kurso de ICH.

Pri la kadra temo dum 4 horoj prelegis Detlev Blanke. Pri difinitaj kolektoj krome informis Benno Klehr (Hamburga Esperanto-Klubo), Zsófia Kóródi (La biblioteko Károly Fajsz en la Hungarlanda Fremdlingva Biblioteko, Budapesto), Roland Rotsaert (kolekto en la urba biblioteko Kortrijk, Belgio), Wolfgang Schwarz (Marie-Hankel-Centro Dresden/Germanio), Peter Zilvar (biblioteko de ICH).

Aperis la sugesto, ke iu konstanta komisiono de UEA devus daŭre okupiĝi pri la temo. Eventuale fondota grupo povus renkontiĝi dum la UK-oj kaj utiligi la eblojn de la reto.

Ĉiujn necesajn informojn pri la kleriga centro oni trovos ĉe [www.ic-herzberg.de](http://www.ic-herzberg.de). La Interkultura Centro Herzberg kontakteblas per [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

DB.

## 5 Aranĝoj pasintaj

### 5.1 Konferenco “Strukturo kaj Evoluado de Esperanto – vidpunkto de ĉinoj”,

Kvazaŭ daŭrigo aŭ ripeto de la pasintjara esperantologia konferenco, tamen en alia kadro, okazis fine de la jaro 2004 en Beijing:

La konferenco okazis la 18-an de decembro 2004 kadre de “Forumo pri Humanismaj kaj Sociaj Sciencoj” organizita de Ligo de Sociaj Sciencoj en Beijing. La forumo kutime okazas en la fino de la jaro. El pli ol 100 asocioj de la Ligo, ĉijare oni elektis 18 asociojn, kiuj povis okazigi siajn konferencojn kadre de la Forumo. Ĝojindas, ke Beijing-a Esperanto-Asocio (BEA) troviĝis inter la 18 asocioj. Ĉirkaŭ 70 partoprenintoj ĉeestis la konferencon.

*Li Weilun*, prezidanto de BEA, prezidis la konferencon, kiu daŭris tri horojn. La konferenco povis esti konsiderata daŭrigo de la Esperantologia Konferenco dum la 89-a UK, kies ĉeftemo estis “La rolo de la neeŭropaj lingvoj en la evoluo kaj evoluigo de Esperanto”.

*Akademiano Li Shijun* prelegis pri “Internacieco de Esperanto”. Li i.a. opiniis: “La internacieco de Esperanto kuŝas en ĝiaj internacia alfabeto, radikaro (naturismo) kaj racieco kaj reguleco en la gramatiko (skemismo). Sed ĝia radikaro estas eŭropeca, fremda al la uzantoj de aliaj lingvoj, do ne perfekte internacia. Ĝia gramatiko ne estas tute senescepta, kaj rimarkeblas influo de eŭropaj lingvoj. Same la gramatiko ne estas tute internacia. Iuj pledas por vortaraj “redundo”, aliaj ŝatas enkonduki multe da neeŭropaj radikoj. Ĉio ĉi malfaciligas Esperanton, kies tasko estas oportune solvi la lingvan problemon en internacia komunikado. Por plialtigi la internaciecon de Esperanto

oni devas fari ĝin pli racia, pli regula, pli fleksebla, pli facila, sed ne tuŝi ĝian fundamenton, ĉar revolucio malutilas al la afero.”

*Profesoro Zhou Liuxi* prelegis pri “Kiel orientanoj povas ekspluati la gramatikecon de Esperanto?” Jen estas la ĉeftemo de lia prelego: “Piron iam diris, ke Esperanto estas lingvo ne nur eŭropa, sed ankaŭ azia. La internacieco kaj neŭtraleco troviĝas ankaŭ en ĝia strukturo, ĉar Esperanto estas esence lingvo kaj aglutina kaj analiza, kvankam surbaze de elementoj de fandaj lingvoj eŭropaj. La analizeco de nia lingvo ebligas al la uzantoj fari liberajn esprimojn laŭbezzone, kaj la fundamenta gramatiko oficialigas la rajton tion fari. En la praktiko orientanoj jam multe provas krei efikajn esprimojn en la ordinara lingvo kaj la literatura lingvo, kiuj estas sufiĉe sukcesaj en vortfarado kaj sintakso. Ilia peno, ekspluatanta la latentan povon de Esperanto, igas la lingvon pli riĉa kaj pli fleksebla, kaj sekve helpas disvolvi nian lingvon.”

*Profesoro Liu Haitao* parolis pri “La lingvistikaj konceptoj de Zamenhof”. La preleginto fosis el la antaŭparolo de la unua libro de Esperanto kaj analizis per moderna tekstilaro la “Ekzercaron” de la Fundamento. Surbaze de tiuj ĉi analizoj kaj diraĵoj, li opinias: “Zamenhof klopode kreis sian lingvon por facila, klara kaj preciza komunikado inter diverslingvanoj. Por Zamenhof, la lingvo unuavice estas ilo por komunikado. Do, la lingvo ne nur devas esti facile lernebla, sed ankaŭ tuje rekonebla kaj komforte produkta. Por konstrui tiaĵon, li ne nur eltiris el etnaj lingvoj la ĉefajn radikojn, li ankaŭ faris regulojn por laŭbezzone kombini tiujn radikojn, kreive enkondukis plenfunkciajn afiksojn, kiuj povas multe produkti novajn vortojn surbaze de malgranda vortaro. Por ligi tiujn ĉi radikojn en integraĵo, li kreis klaran kaj travideblan finaĵaron. Zamenhof kreis lingvon kun animo, kiu enkorpigas en ege regula gramatiko kaj vortfarado kaj klara fina aro liganta vortojn por esprimi la kompleksan ideon. Tamen, en la evoluado de Esperanto modela tekstaro estas tre grava por fari la animon viva en la lingva sistemo. Zamenhof kreive konstruis Esperanton surbaze de tute nova lingvistika koncepto por eŭropanoj, tamen li ne plene evoluigis sian lingvon laŭ tiuj principoj por havi facilan komencon de la lingvo. Alidire, la sociiĝo de Esperanto ne laŭis la vojon konstruitan en la unua libro, kaj laŭis la vojon indikita en la dua libro. La markilo de la vojo estas modelaj tekstoj. Hodiaŭ estas tempo por plene evoluigi la lingvon laŭ ĝia animo, ĉar tio estas utila por pli vastaj lernantaroj en Azio. Tamen, ĉiuj devas agadi en la kadro permesita de la Fundamento, ĉar oni devas strebi stabilan evoluadon.”

*Esploristo Zheng Bocheng* prelegis pri “Konduka rolo de Esperanto en lernado de la angla lingvo (eŭropaj lingvoj) por ĉinoj”. Li argumentis: “Esperanto estas ideala internacia lingvo. Populariĝo de Esperanto ankoraŭ estas tre malproksima. Nuntempe plejparto de referencaj literaturoj, inkluzive de tiuj publikigitaj en ne-anglolingvaj landoj, estas en la angla lingvo. Tio estas evidenta precipe en la referencaj literaturoj de medicinaj sciencoj. Lernado de la angla lingvo verŝajne necesas. Esperanto originas en Eŭropo kaj plejparto de ĝia radikaro estas eŭropeca, prenita precipe el romanaj lingvoj. En la 11-a jarcento Normana dinastio invadis Anglolandon kaj ekregis, influante la anglan lingvon per la franca lingvo. Pli ol 70% de la anglaj vortoj havas la samajn radikojn kiel la francaj vortoj. Do, lernado de Esperanto helpas al lernado de aliaj lingvoj, inkluzive la anglan lingvon, kaj inverse.”

La konferenco estis interesa kaj signifa, ĉar ĝi eble estas la unua konferenco en Ĉinio pri Esperantologio laŭ pli strikta difino. Delonge la anoj de Ĉina Esperanta movado, precipe la gvidantoj de Ĉina Esperanto Ligo ignoras la sciencajn aspektojn de la lingvo. Tamen, nun finfine estis bona komenco. Por fortigi la studojn de la lingvo, en BEA oni starigis novan grupon pri sciencaj aspektoj de Esperanto. Espereble, ĉio estos utila por evoluigi interlingvistikon kaj esperantologion en Ĉinio.

*Raportis: Liu Haitao*

## 5.2 Teknologia konferenco en Vilno

Vilna Teknika Kolegio ĵus eldonis artikolaron de sciencteknika konferenco sub titolo "Siuolaikines teknologijos studijose ir praktikoje" (Nuntempaj teknologioj en studado kaj praktiko). Tiu-cê konferenco jam okazis la 18-an de novembro, 2003. En 96-paĝa libro estas publikigita artikolo (paĝoj 27-32) de la direktoro de tiu ĉi Teknika Kolegio, Estrarano de Litova Esperanto-Asocio, *Algimantas Piliponis* "Daugiakalbyste studijose pakeliui i Europos Sajunga" (Multlingveco en studado laŭvoje al Eŭropa Unio). La aŭtoro laŭ diversaj aspektoj analizas la lingvan situacion en la nuna plivastiĝinta Eŭropo kaj proponas Esperanton kiel solvon de la lingva problemo.

*Povilas Jegorovas* [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)

## **6 Honorigoj al la lingvisto kaj interlingvisto Paul Ariste (1905-1990)**

### **6.1 Konferenco memore al Paul Ariste**

La 2-an ĝis 5-an de Februaro 2005 en la estona universitata urbo Tartu okazis kelkaj aranĝoj por memorigi 100-jariĝon de unu el la plej famaj estonoj, akademiano, finno-ugristo, interlingvisto, esperantisto *prof. Paul Ariste* (1905-1990).

Inter la partoprenantoj estis multaj estonaj eminentuloj, gastoj el finno-ugraj respublikoj de Rusio, ankaŭ la konataj interlingvistoj kaj esperantologoj *prof. Aleksandr Duliĉenko* (Tartu), *prof. Sergej Kuznecov* (Moskvo), *prof. Helmar Frank* el Germanio, *dr. Věra Barandovská-Frank* el Germanio, *Brian Moon* el Luksemburgio. El Litovio la aranĝojn partoprenis la prezidanto de la Senato de la universitato de Siauliai *prof. habil. dr. Aloyzas Gudavicius*, kiu estos rektoro de IKU de la ĉi-jara 90-a UK en Vilno kaj vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio; esperantistino el Kaunas *Vera Valentaitė* kaj prezidanto de Litova Esperanto-Asocio *Povilas Jegorovas*, kiu ĉi-foje reprezentis UEA en la aranĝoj.

La 2-an de Februaro la partoprenantoj vizitis la naskiĝlokon de Paul Ariste en Torma kaj okazigis kolokvon pri la temo "Paul Ariste - sukcesa esploranto de finno-ugraj lingvoj".

La 3-an de Februaro en la universitata ĉefsalono okazis memorkonferenco al Paul Ariste. Estis legitaj multaj raportoj pri diversflanka agado de la honorito (en estona, rusa kaj aliaj lingvoj). En la konferenco partoprenis kaj parolis ankaŭ la *prezidanto de Estonio Arnold Ruutel*. Multaj parolantoj pli aŭ malpli vaste tuŝis la esperantistecon de Paul Ariste kaj lian interlingvistikan kreadon. *Doc. Enn Ernits* prelegis pri la temo "Paul Ariste kaj interlingvistiko". La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio *Povilas Jegorovas* legis mesaĝon de la prezidanto de UEA *d-ro Renato Corsetti* al la konferenco. Ĝi estis la sola parolado en Esperanto en tiu konferenco. Parolis la rektoro de la universitato kaj la prezidanto de Estona Akademio de Sciencoj. Post la tagmanĝo por specialaj gastoj fare de la Urba registaro estis vizitita la tombo de Paul Ariste en la tombejo Raadi. Vespere okazis akcepto de la universitata rektoro.

La 4-an de Februaro en la urbodomo de Tartu okazis internacia scienca konferenco "Interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko", organizita de la Tartua universitato, katedro pri slava filologio de la filozofia fakultato. Ĝin gvidis *prof. Aleksandr Duliĉenko*. La konferencon salutis la vicurbestro *Vladimir Shokman*.

Estis legitaj 12 sciencaj raportoj pri diversaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj (en la estona, rusa, Esperanto, angla lingvoj). Krome, kelkaj raportoj estis senditaj poŝte al la konferenco. *Prof. dr. habil. Aloyzas Gudavicius* faris raporton pri la temo "Etnolingvistikaj aspektoj de Esperanto".



La resumaj materialoj de la konferenco aperis broŝure, poste aperos speciala numero de "Interlingvistika Tartuensis" kun la plenaj raportoj de la konferenco kaj senditaj materialoj. Skriban kontribuon al la konferenco sendis ankaŭ la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida Cizikaite*.

Okaze de la 100-jariĝo de Paul Ariste Universala Esperanto-Asocio, Interlingvistika Internacia Asocio, Tartua Esperanto-Societo kaj la estona Societo B.G. Forselius fondis internacian honorpremion Academicus Ariste. Ĝi estas dolomitaĵo havanta formon de antikva libro. Dum la konferenco estis enmanigitaj tiuj premioj al la unuaj honoritoj, t.e. *prof. Aleksandr Duliĉenko*, *prof. Sergej Kuznecov*, *prof. Helmar Frank*, la premioj estas aljuĝitaj ankaŭ al *d-ro Detlev Blanke*, *prof. Humphrey Tonkin* kaj *prof. Michel Duc Goninaz*, enmanigitaj al ili poste. Okaze de la evento la vicurbestro de Tartu aranĝis akcepton.

Fine de la konferenco estis fondita Internacia Interlingvistika Asocio.

Ĝia prezidanto estis elektita *prof. Aleksandr Duliĉenko*.

La 5-an de Februaro okazis kunveno de estonaj esperantistoj kun partopreno de gastoj. Pri Paul Ariste estis aranĝitaj ekspozicioj en du muzeoj kaj en la universitata scienca biblioteko. Estis eldonita speciala poŝta koverto kaj stampilo okaze de 100-jariĝo de Paul Ariste. Okaze de la evento Tartua Esperanto-Societo eldonis la 3-an kajeron de almanako "Ceĵano" dediĉita al 100-jariĝo de Paul Ariste, en ĝi estas publikigitaj krom ĉio alia rememoroj de la litova esperantisto *Zenonas Sabalys* pri Paul Ariste.

Al la jubileo de Paul Ariste estis dediĉita plena numero de universitata gazeto "Universitas Tartuensis". Ne mankis kultura programo (ekskurso tra la urbo, teatra spektaklo, folkloro k.s.). Finfine oni devas noti grandegan laboron de *Madis Linnamagi*, *Enn Ernits* kaj *prof. Aleksandr Duliĉenko*, kion ili faris por la konferenco.

*Povilas Jegorovas*

## **6.2 Internacia premio *ACADEMICUS ARISTE***

Paul Ariste (ĝis 1927 Berg, 03.02.1905–02.02.1990), filo de estona vilaĝa forĝisto, studis en la Tartua Universitato, iĝis eminenta personeco kun multflankaj interesoj: pedagogo, finno-ugristo kaj interlingvisto, gvidanto kaj organizanto de la scienca laboro, profesoro kaj membro de Estona Akademio de la Sciencoj (1954).

P. Ariste esploris en finno-ugristiko kiel grandajn tiel ankaŭ etajn kaj formortantajn lingvojn, en interlingvistiko li traktis internacian lingvouzadon kaj lingvoplanadon. P. Ariste scipovis lingvojn el kelkaj lingvaj familioj, i.a planlingvojn apartenantajn al la hindeŭropa lingva familio. Li scienculiĝis per la planlingvo Esperanto jam 15-jaraĝe.

Paul Ariste estis eksterlanda membro de Scienca Akademio de Finnlando (1969) kaj Akademio de Finnlando (1980), membro (1968) kaj prezidanto (1980–1990) de Internacia Finno-ugristika Komitato, membro de Lingvistika Societo de Usono (1972), Akademio de Esperanto (1968–1975), Internacia Akademio de la Sciencoj San Marino (1983) kaj Komitato de Honoraj Patronoj ĉe Universala Esperanto-Asocio (1984). Li fariĝis Honora Doktoro de Helsinkia (1969), Szegeda (1971), Tamperea (1975) kaj Latvia universitatoj (1989), Honora Membro de Hungara Akademio de la Sciencoj (05.05.1967), Esperanto-Asocio de Estonio (1986) kaj Tartua Esperanto-Societo (1982) ktp.

P. Ariste estis elektita Honora Civitano de Tartu (1982) kaj eminenta centulo de la XX-jarcenta Estonio kiel celportanto de nacia ekzisto. Li deklaris klare: "*Eesti keel oli, on ja leeb!*" (La Estona lingvo estis, ekzistos kaj gloros!). Samtempe P. Ariste zorgegis kiel globala pensanto pri internacia lingvouzado kaj ĝia justa politika regulado, estonto de malgrandaj lingvoj. Li rekomendis apliki en la internacia komunikado bonpensite kreitajn planlingvojn, por neŭtraligi dominadon de grandaj nacilingvoj en la politika kaj ekonomia vivo.

La fondantoj

B. G. Forselius-Societo (05.03.2004), Internacia Interlingvistika Asocio (04.02.2005), Tartua Esperanto-Societo (01.11.1983, 14.05.1991 kaj 15.04.2004) kaj Universala Esperanto-Asocio (15.12.2004),

*konsiderante* aspirojn, akirojn kaj konatecon de Paul Ariste kaj gvidataj de

- pedagogia filozofio, i.a de la instruoj de Jan Amos Komenský (Comenius, 1592–1670), René Descartes (Cartesius, 1596–1650) kaj Gottfried Wilhelm Leibniz (1646–1716);
- vivprincipoj de la nuntempa civito, i.a de la Bologna’ Deklaro (1999), la rezolucioj IV.1.4.422-4224 (1954) kaj XI.4.4.218, 23 C/COM.IV/2 (1985) de la Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko,
- la Disvolva Konceptaro de la Estona Civito (12.12.2002) kaj
- la Konstitucio de Eŭropa Unio (2004),

*eldonas* ekde 2005 internacian premion *Academicus Ariste*. La premio estas jure protektita.

(ricevita de *Madis Linnamägi*)

## 7 Kvara Nitobe-simpozio okazonta

La kvara *Nitobe-simpozio* okazos post la 90-a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno, Litovio, de la 30-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto 2005.

**Origino.** La Nitobe-Simpozio portas la nomon de Nitobe Inazo (1862-1933), Vica Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu strebis al lingva egaleco kaj lingva justeco en tiu organizaĵo. La unua Nitobe-Simpozio okazis en Prago en 1996. Posta simpozioj okazis en Berlino (1999) kaj Pekino (2004).

**Temo.** La kvara simpozio traktos la kadran temon *Lingvopolitikaj aspektoj de la ekspansio de Eŭropa Unio*.

**Celo.** Inter la multaj demandoj levitaj de la plivastigita membraro de Eŭropa Unio estas la demando pri lingvoj. Kiujn aranĝojn oni faru pri la uzo de lingvoj en la diversaj EU-instancoj mem, kaj kiujn politikojn oni enkonduku ekzemple rilate la lernadon de lingvoj en la edukaj sistemoj de la diversaj landoj? La relativa manko de formalaj politikoj en tiu ĉi tereno iom post iom kondukas aktuale al neformalaj aranĝoj, kiuj povus minaci la lingvojn kaj la kulturajn valorojn de iuj pli malgrandaj ŝtatoj kaj povus kompromiti la principon de egaleco inter EU-membroj. La proponata simpozio en Vilno celos esplori la diversajn politikajn alternativojn kaj serĉos komunan interkonsenton pri kelkaj bazaj rekomendoj pri la lingva politiko de EU en la novaj kondiĉoj.

**Aŭspiciantoj.** La Universitato de Vilno, la Litova Akademio de Sciencoj, la Komitato pri Eŭropaj Aferoj de la Litova Parlamento, kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj.

**Programo.** La formala parto de la simpozio komenciĝos sabaton, la 30-an de julio, je 14:00 h, kaj finiĝos lundon, la 1-an de aŭgusto, je 17:00 h. La programo konsistos el prelegoj de invititaj prelegantoj, prezentoj de formalaj referaĵoj de invititoj, kaj ĝenerala debato kaj diskutado.

**Kunvenejo.** La Simpozio okazos en la Konstitucia Salono de la Litovia Parlaŭmento.

**Organizado.** La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) respondecos pri la organizado de la simpozio, kune kun la aliaj aŭspiciantoj kaj la surloka helpo de la Litovia Esperanto-Asocio. CED instigas esploron, instruadon kaj publikigon pri internaciaj lingvaj demandoj kaj eldonas la scienca revuon *Language Problems and Language Planning (Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado)*.

Estas planate publikigi la aktojn de la simpozio.

(Laŭ informoj de la prepara teamo)

## 8 Universitataj disertacioj

### Doktoriga Disertacio

*Martinelli, Perla* (2003): Edmond Privat. L'uomo e l'opera. Milano: Centro Italiano di Interlinguistica, 201 p. (Universitato Milano)

### Studofinaj disertacioj

*Cizikaite, Aida* (2005) : Prava jazykov: status de jure i de facto. Moskva: Moskovskij gosudarstvennyj industrialnyj universitet (Insitut distancionnogo obučeniĵa ), 72 p. (Lingvaj rajtoj: jure kaj fakte; bakalaŭreco pri juro)

*Someren, Emily van* (2005): The EU Language Regime: Lingual and Translational Problems. University of Amsterdam (First Supervisor: Wim Jansen), Utrecht University (Second Supervisor: Wim Zonneveld), 42 p. (magistra disertacio)

*Costantini, Mariella* (2004): Esperantofonia Precoce: Uno studio sulla lunghezza media dell'enunciato. (Frua parolado de Esperanto: Studo pri la meznombra longeco de la parol-unuo.). Roma: Universita 'La Sapienza, Facolta' di Psicologia 1, 126 + 36 p., (Magistra disertacio)

(Enhavo:1. Lingvoakirado, 2. Dulingveco: difinoj kaj ĝeneralaj trajtoj, 3. Esperanto kiel internacia lingvo kaj Esperanto kiel hejma lingvo, 4. La esploro: - objektivoj kaj hipotezoj, - testataj infanoj, - metodoj, - rezultoj, - diskutoj, 5. Konkludoj, Aldonaĵoj, Bibliografiaj indikoj)

## 9 Ottó Haszpra – membro de la Hungara Akademio de Sciencoj

*Prof. D-ro Ottó Haszpra* en Budapeŝto - redaktoro de la iama fama eldonaĵo "Sciencaj Komunikadoj en Esperanto" - estas ne nur membro de la Akademio de Esperanto, sed ankaŭ de la Hungara Akademio de Sciencoj.

Li estis elektita ties korespondanta membro en 1998, kaj en 2004 ties ordinara membro.

La 14-an de aprilo 2005, en la Salono de la Akademio li faris sian membriĝan prelegon, kies titolo estis: "Samrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado" - sekvita de granda aplaŭdo de la ĉ. 60-persona aŭskultantaro.

Supozeble tiu prelego estis la unua en la historio de la Scienca Akademio, kiam la membriĝa prelego plene temis pri Esperanto kaj temoj ligitaj al la Internacia Lingvo.

Gratulojn al Profesoro Haszpra, kaj pliajn multajn sukcesojn!

(Laŭ *L. Molnár* kaj *László Szilvási*)

## 10 Pri GIL en Ido

En n-ro 330 (Januaro-Aprilo 2004) de la revuo “Progreso”, oficiala organo de la monda organizaĵo de idistoj, “Uniono por la Linguo Internaciona”, sur p. 31-33 troviĝas artikolo de Günther Anton, la eksprezidanto de la Unio, pri la germana “Gesellschaft für Interlinguistik e.V.”, **GIL** (Societo pri interlingvistiko). Jen specimena paĝo por trejni viajn konojn en Ido:

---

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:++ 49-30-54 12 633, fakso:++ 49-30-54 56 742, [dblanke.gil@snafu.de](mailto:dblanke.gil@snafu.de). Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.**

---